

www.carelinks.net email: info@carelinks.net

VIVO KUN ALKOHOLISMO

**KELKAJ KONSILOJ POR KRISTANOJ –
INVITO AL PRIPENSO**

DANKAN HISTER

ENHAVO

Antaŭparolo

1. Kompreni Alkoholulon.

1.1 Enkonduko

1.2 Neado

Plidetala studo: Kio sekvas de la kredo, ke Dio vidas kaj scias ĉion.

1.3 Kelkaj medicinaj aspektoj

Plidetala studo: Kio sekvas de la kredo, ke la homojn kreis Dio.

1.4 Kulpo

1.5 La naturo de peko kaj tento

2. Kompreni Vian Respondon

2.1 Enkonduko

2.2 Neado

2.3 Helpi aŭ doni povecon?

2.4 Aparteco

2.5 Pacienco kaj pardono

Plidetala studo: Pento kaj pardono

3. La Biblia Respondo

3.1 Enkonduko

3.2 Evidenteco kaj konvinko

Plidetala studo: La Vero: Biblia analizo

3.3 Pento praktike

3.4 La nova vivo

4. Post La Venko

5. Konkludoj

Aldono 1: La Dek Du Paŝoj

Aldono 2: Kelkaj Kristanaj Kontaktadreso

Ĉiuj citaĵoj estas indikitaj laŭ la Sankta Biblio, eldonita esperantlingve de Brita kaj Alilanda Biblia Societo (Londono) kaj Nacia Biblia Societo de Skotlando (Edinburgo), 1984

Jam estas la tempo alfronti la problemon de alkoholo en nia komunumo. Ĉirkaŭ 14 milionoj da amerikanoj havas problemojn pro alkoholo (1). En 43% da amerikaj familioj unu el la familianoj estas alkoholulo (2). En Ameriko la laborkapablo de 10% da laboristoj suferas pro alkoholismo. Eĉ pli malbone status la afero en Rusio kaj aliaj landoj de Orienta Eŭropo. Se ajna alia malsano influus nacion tiel, kiel influas alkoholismo, estus anoncita nacia krizo. Fakte, alkoholismo estas grandega kaj en signifa grado kaŝita problemo. Tio, ke ni estas dediĉitaj kristanoj, ne faras nin imunaj de tiu ĉi problemo. Ĉi tio signifas, ke multaj kristanoj kunvivas kun alkoholuloj, kiuj estas iliaj parencoj kaj karaj por ili homoj. Tiu ĉi mesaĝo estas adresita al ili; ĝi ne estas helplernilo kuraci alkoholismon mem.

Mi ne opinias min tute kompetenta por verki tiun ĉi studon. Mi neniam estis alkoholulo, neniam havis problemojn pri alkoholo. Mi kreskis en la familio, kie alkoholaĵojn oni trinkis, sed neniam trouzis ilin. Mi loĝas kun edzino, kiu ankaŭ uzas alkoholaĵojn nur modere. Plejparte mi loĝas en malriĉaj landoj, predikante tie la Vorton de Dio; la plej grandan parton de mia plenaĝa vivo mi travivis en eks-Sovetio. Ĝuste en tiuj landoj la procento da alkoholuloj estas la plej alta en la mondo. Mi predikas al diversaj homoj – kiel regulo, mi laboras individue, kaj alkohola problemo aperis multfoje. Mi sentas la ŝarĝon de la slava mondo, kie alkoholo estas nia la plej granda malbeno. Multfoje mi vidis tion, kio estas kaŝita de fremdaj okuloj: malhonoron, doloron kaj disfalon de familioj, kiuj estis devigitaj vivi kun tiu ĉi problemo. Homo ĉiame trinkanta alkoholaĵon, eĉ “moderkvante”, kaŭzas al la socio grandan malprofiton. Rezulte, en 1990 mi decidis por mi mem, ke mi tute ne trinkos alkoholaĵon. Por mi ne estas malfacile plenumi mian promeson. Sed alkoholuloj ne povas drinki "moderkvante". Ili devas ne drinki tute. Mi havas multe da amikoj-krisanoj, kiuj estas alkoholuloj. Se mi amas ilin, mi devas agi tiamaniere: mi devas diri al ili: "Atentu min. Vi povas vivi sen alkoholo. Tute. Mi ne drinkas, neniom. Mi ne drinkas post via spino, kiam vi ne povas vidi min. Mi ne drinkas tute. Mi estas kun vi. Neniam trankviligu vin, ke vi povas drinki "moderkvante", pro tio, ke mi mem tion faras. Mi ne faras tion". Tio estas mia persona kompreno de la vortoj de Paŭlo relate al tio, ke ni devas ne fari tion, kio, kvankam ne kontraŭas al nia konscienco, estas ŝtono de falpuŝiĝo por aliaj homoj. Liaj vortoj en la Epistoloj al la Romanoj kaj al la Korintanoj montras, ke ni devas ne fari ion ajn, publike aŭ malpublike, kio povas instigi kredantan homon iri returne al antaŭaj kutimoj, kiuj estis pekaj. En la unua jarcento tio estis idoladorado kaj cetero. Por ni, aŭ almenaŭ por mi, ĉar mi loĝas en Orienta Eŭropo, tio estas alkoholo. Pli bone do ne fari tion, kio kuraĝigus kredanton, “por kiu Kristo mortis”, iri returne al peka vivmaniero. Jen kio estas skribite en la Malnova Testamento: antaŭ blindulo ne kuŝigu falilon – tio estas, ne faru tion, kio kaŭzos al iu falon. "Ni donu en nenio okazon por maledifon" (2 Kor 6:3-4). Eĉ dum mia edziĝfestoj nur mi sola ne trinkis alkoholaĵojn – nek unu gluton. Tion mi diras ne por fanfaroni. Ĉi tio ne estas por mi ofero. Mi ne instigas pri tuta sindeteno, eĉ kvankam tio estas mia pozicio, mia persona konvinko (3). Mi diras pri tio nur tial, ke mi scias, kiel multe da miaj amikoj kaj iliaj familianoj suferas pro alkoholismo. Tiujn ĉi vortojn mi skribas ne nur por alkoholuloj, sed ankaŭ por iliaj familianoj, amikoj kaj por ĉiuj homoj, kiuj legos tiujn ĉi liniojn. Mi volas, ke vi ĉiuj ekkonsciu tion, kion mi vidis... malfeliĉojn, plagan situacion, en kiu vi estas. Tio maltrankviligas min, kaj pro tio mi ne trinkas alkoholaĵojn jam dum 14 jaroj (krom la vino dum dispecigo de pano).
Kun preĝo tiujn ĉi liniojn skribis

Dankan Hister
PO Box 90, Riga 1007, Latvio
info@carelinks.net

www.carelinks.net

1. KOMPRENI LA ALKOHOLULON

1.1 ENKONDUKO

Kutime ni koncentras nian atenton nur sur la simptomoj de la problemo. Via edzino drinkas. Pro tio ŝi ne prizorgas la infanojn, havas problemojn pri mono. Ŝia atento ĉiame estas allogita al la botelo, sed ne al vi, aŭ al iu alia. Sed por savi ŝin, la edzo devas provi kompreni ŝin. Ne necese kompreni *kial* ŝi estas alkoholulino – tio estas neatingebla eĉ por la plej bonaj fizioterapistoj. Eĉ la Sankta Biblio nenion diras pri tio. Sed li devas kompreni, kion ŝi sentas, estante alkoholulino.

1.2 NEADO

Neado estas la ŝlosilo al alkoholismo. Alkoholismo estas malsano, kiun alkoholuloj mem ne enkalkulas kiel malsanon kaj ili ne kredas, ke malsanas je ĝi. Alkoholismo kondukas al mensa, korpa kaj morala degradado, kaj je la unua stadio de la malsano vin lasas honesteco. Dekomence vi mensogas nemulte... Kaj antaŭ ĉio, la drinkemulo mensogas al si mem:

Mi drinkis nur dufoje..., mi ne drinkis la tutan semajnon..., mi ja ne drinkas tiom multe, kiom drinkas... (Tom., Sergeo, Svetlana, Sara...).

Pli poste drinkemulo komencas trompi tiujn, kiuj estas ĉirkaŭ li. Ĉiun provon interparoli kun li pri tiu ĉi problemo li malakceptas. Kaj tiam tuj ekestas morala demando. Mensogado estas peko. Ni scias el la Sankta Skribo, ke la koro de nepentinta homo estas nefidinda (Jer 17:9). Nia interna "diablo" estas trompo. Per trompo ni enigis nin mem en pekon. Iafoje ni eĉ ribelas kontraŭ Dio kaj Liaj vojoj. Ni diversmaniere pravigas niajn agojn, konvinkas nin mem, ke ni estas aparta okazo, ke en nia okazo nia konduto estas ĝusta. Do, alkoholismo komenciĝas per mensogo rilate al ni mem, al Dio kaj al homoj. La alkoholulo pli kaj pli eniras en tiun ĉi staton, ĉar liaj ĉirkaŭantoj finfine subtenas lin. Ili mensogas pri kiom li drinkas, kaj ili penas trovi pravigon al liaj agoj. Senkonscie li kreas al si subtenoreton, kiu helpas al li daŭrigi drinkadon. Tio ne signifas, ke ĉiuj ĉirkaŭ li estas kulpaj. Ili trafis la sindromon de rano – rano elsaltos el bolanta akvo, se oni enĵetos ĝin tien. Sed se ranon oni metas en malvarman akvon kaj malrapide plialtigas la temperaturon de la akvo, ĝi restos en la iom post iome ekboliĝanta akvo ĝis kiam ĝi mortos. Ĉirkaŭantoj devas helpi al alkoholulo, komprenigante al li lian situacion. Estas reale, ke homo povas reveni al sia normala vivo – al vivo laŭ la intenco de Dio., kaj tio estos granda progresiva ŝanĝo. Iu aparta danĝero de la malsano estas en tio, ke li iros plu laŭ la vojo nedestinata al ni de Dio. Komplikeco de la malsano estas en tio, ke alkoholismo delogas homon de la realeco. La alkoholulo koncentras sian atenton sur specifaj detaloj – "mi ne manĝis manĝaĵon de la infanoj, sed vi kulpas min pri tio... mi ne faris tion... vi havas monon en via monujo... mi trinkis bieron, sed ne vodkon... mi trinkis kontraŭ mia mono... min trafis malfeliĉo...". Tamen ĉiuj tiuj kaj similaj al ili eldiroj venas nur de deziro deflankiĝi de la realeco. "Venante al la vero", en la pli vasta senco de tiu diro, estas la esenco de resanigo. Alkoholismo estas baze malsano de la animo, pereco de la personeco; kuraci alkoholismon signifas transformigi la personecon laŭ la bildo de Dio.

Dum la malsano progresas, alkoholuloj pli kaj pli mensogas, kaj pli kaj pli da homoj iĝas enigitaj en tiun reton de malvereco. Jen tial alkoholismo estas grava peko, pri kiu avertas la Biblio. Nia Patro atendas de ni komprenon kaj bonan konduton, kiu kontrastas al trompo kaj mensogo. Li vidas nin ĝisfunde, kaj se ni fidus al tio, ni devas esti "travideblaj" antaŭ Li. La alkoholulo mensogas por havi eblecon aĉeti alkoholaĵojn, kaj ankaŭ por havi lokon kaj tempon por drinki. Unu mensogo ĉiam tiras post si alian, kaj alkoholulo mensogas eĉ tiam, kiam li tion ne bezonas. La kutimo iĝas mania. Ĝuste al tia konduto devas esti direktita kuracado de la alkoholulo – ne nur al la bezono ĉesigi lin drinki.

Klasika eraro de tiuj, kiuj zorgas pri alkoholuloj estas tio, ke ili penas devigi la alkoholulon "promesi neniam drinki denove". Certe, la alkoholulo promesas, sed poste li malplenumas siajn promesojn, ĉiamaniere elturniĝante por pravigi kaj defendi sin. Kaj ĉio ripetiĝas denove kaj denove. Tio, ke la

alkoholulo ne povas teni siajn promesojn, estas parto de alkoholismo, ĝis post la stadio de neado. La neplenumitaj promesoj elvokas en la alkoholulo malamon al si mem; tio ankaŭ estas kialo, pro kiu li aŭ ŝi denove komencas drinki. Kaj la problemo plidaŭriĝas.

Estas tre malfacile kompreni, kial homoj iĝas alkoholuloj. La kialoj kvazaŭ forglitas de ni. Tamen, se ni scias la kialon de okazintaĵo, ni pli facile venkas la problemon. La "mistero" mem de alkoholismo estas unu kialo, pro kiu estas malfacile akcepti, ke oni malsanas. Kaj tion necesas komprenigi al la alkoholulo kun amo. Necesas forgesi pri "kial", se forestas reala ebleco trovi la kialon de la malsaniĝo. La realeco estas en tio, ke la alkoholulo estas alkoholulo. Akcepti la neklarigeblan helpas al alkoholulo turni sin al Dio. Lin allogas la neklarigebla "alta forto", pri kiu anonimaj alkoholuloj parolas en la grupoj, nomitaj "Dek du paŝoj". La mistero de alkoholismo devigas ilin turni sin al Dio. La neklarigeblan necesas akcepti. Ĝuste pro tio la psikiatro-ateisto Karl Ĝung agnoskis sin nekapabla kuraci alkoholismon. Ĝi estas ekster medicino kaj ekster psikologio. Sperto de lukto kun la peko/malsano instruas, ke "la vojoj de homo estas ne laŭ lia volo, ke homo iranta ne povas libere direkti siajn paŝojn" (Jer 10:23). Kaj tio klarigas, kial eĉ nekredantaj alkoholuloj ofte havas pli klaran spiritan komprenon dum sia lukto kun la malsano. Ni devas uzi la veron de Dio por subteni tiujn ĉi luktantajn virojn kaj virinojn kaj helpi al ili eksenti bezonon de Dio kaj Lia Vero.

Rememoru, ke alkoholismo ne havas limojn. Al ĝi inklinis ĉiuj, de prezidanto ĝis kamparano. Estas sciite, ke alkoholo influas al virinoj pli forte, ol al viroj. Oni rimarkis, ke ĉar virinoj-alkoholulinoj havas pli multe da sociaj malfacilaĵoj ol viroj, ili pli malfacile liberiĝas de la stadio de "neado". Iliaj familianoj devas ĉiam esti sentemaj al tiu ĉi fakto.

PLIDETALA STUDO

KONSEKVENCOJ DE LA KREDO, KE DIO VIDAS KAJ SCIAS ĈION

Pekojn kaŝi neblas. Ijob sciis tion, kaj tial li efektive kredis, ke Dio scias ĉion. "Ĉu Li (Dio) ne vidas mian konduton, ne kalkulas ĉiujn miajn paŝojn?" (Ijob 31:4). Preskaŭ la samon Dio devis rememorigi al Izrael: "Ĉu homo povas kaŝi sin en tia sekreta loko, kie Mi lin ne vidus? – diras la Eternulo; ĉu ne Mi plenigis la ĉielon kaj la teron? – diras la Eternulo" (Jer 23:24). El la kunteksto klaras, ke Li alvokas homojn lasi siajn pekojn. Ni devas peni por eniri la Regnon, ĉar Dio scias absolute ĉiun nian penson kaj ĉiujn farojn niajn, kaj, finrezulte, Li juĝos nin laŭ faroj kaj pensoj niaj (Heb 4:11-13). La Surmonta prediko estas bazita je la scio, ke Dio vidas kaj scias ĉion. Niaj pensoj ekvivalentas al niaj faroj, tamen ofte ni opinias nin sufiĉe saĝaj, por ne malkaŝi niajn pensojn en niaj faroj. Sed Dio vidas nin "ĝisprofunde". Kompreno de tio helpas al ni eviti la plej grandan danĝeron en la vivo de la kredantoj: ŝajniĝi, ke ni havas altan nivelon de spiriteco, reale estante "spirite mortintoj". Fred Barling komentis tion tiel: "Dio tiun homon amas, kiu estas tratute malfalsa. Tiun homon, en kiu koincidas tio, kio estas "ekstere" kaj "ene" de li. Tiun, kiu estas certa: "Dio ĉiam vidas min". Atentu, ke la Sinjoro Jesuo komencas ĉiun el siaj paroloj al eklezioj per la vortoj: "Mi scias...". Lia ĉioscio devas esti kialo, ke homoj ekvolu ŝanĝi sian konduton. La kritikaj vortoj de Jesuo al tiuj eklezioj atestas, ke ili ne sufiĉe atentis la fakton, ke Li scias ilin kaj iliajn farojn. Ĥana respondis al la ĉioscio de Dio; kaj ŝi petas Penina-n ne esti fiera kaj ne paroli malhumile: "Ne parolu plu fieraĵon; malhumilaĵo ne eliru plu el via buŝo; ĉar la Eternulo estas Dio ĉioscianta, kaj Li starigas la aferojn" (1 Sam 2:3).

La hebrea lingvo respegulas iujn trajtojn de la naturo de la Diaj vojoj. La hebrea vorto por "vidi", precipe kiam ĝi estas uzata rilate al "observo" de Dio, signifas ankaŭ "provizi". Abraham trankviligis Isaakon, dirinte, ke "Dio antaŭvidos (provizos) al Si la ŝafon" (Gen 22:8). "Kaj Abraham donis al tiu loko la nomon: La Eternulo Vidas; tial oni ankoraŭ nun diras: Sur la monto, kie la Eternulo aperas" (Gen 22:14). La saman vorton uzas ankaŭ Saul, petante siajn servistojn "elserĉi" (provizi) homon (1 Sam 16:17). Hagar, preĝante al la Eternulo, nomis Lin: "Dio-kiu-min-vidas" (Gen 16:13), ŝi esprimis sian dankemon pro Lia provizo. Kion tio signifas? Praktike, tion, ke Dio vidas kaj scias ĉion. Kaj pro tio Li povas provizi (antaŭvidi) nin per ĉio necesa en ĉiuj cirkonstancoj de nia vivo.

MALFERMECO ANTAŬ DIO

Pro tio, ke Dio vidas kaj scias ĉion, ne utilas ne malfermi niajn vivojn antaŭ Li en preĝoj kaj en meditoj. Jeremia "malkovris" sian koron antaŭ Dio, ĉar li sciis, ke Dio "esploras la internon kaj la koron" (Jer 11:20). Pro tio, povas esti, homoj, similaj al Jeremia, iufojon estis iom "malĝentilaj" antaŭ Dio – ja ili parolis tion, kion ili sentis. Ili sciis, ke Dio scias iliajn pensojn, kaj tial estas sencece paroli belajn vortojn en preĝo, havante amaron al Li en la koro. La psalmokantistoj parolas kun Dio pli malĝentile, ol ni. Ili, ne komprenante kiel Dio agas en iliaj vivoj, elverŝas siajn sentojn, koleron kaj ĉagrenon pri siaj malamikoj... Ili parolas kun Dio tiel, kvazaŭ Li estas ilia amiko aŭ konatulo. David petas Dion, ke Li "vekiĝu...por fari al mi juĝon... pri mia disputo" (Ps 35:23); li protestas, ke li estas ĝusta, kaj sopiras al juĝo de Dio. Same agas ankaŭ la profetoj en komentoj pri siaj profetaĵoj. David ofte pensas: "Tiuj ĉi homoj estas malbenitaj!", sed li scias, ke ne li, sed Dio malbenos ilin. Kiam ni, simile al David, opinias, ke niaj malamikoj estas maljustaj al ni, ni povas:

1. Venĝi. Sed tio ne taŭgas de la Biblia vidpunkto.
2. Forĵeti la koleron kaj ofendsentojn. Sed ili diversmaniere aperas denove. Kaj tiam ni aliĝas al milionoj da homoj en la mondo, kiuj iel agas venĝe al aliaj.
3. Fari kiel David: montri tiujn sentojn al Dio tiaj, kiaj ili estas, ne glatigante ilin. Diri ilin preĝe, kaj Dio mem decidos la problemon. En la nuntempa psikiatrio estas tia regulo: se ni ne povas eligi el ni iujn sentojn, ni devas esprimi ilin konvenmaniere.

Tio respegulas mian nunan komprenon de la "malbenantaj" psalmoj. Tiuj homaj sentelverŝoj estis akceptitaj de Dio kiel preĝoj. La aŭtoro de Psalmo 137, deprimita pro la venko de la babelanoj, mokata de malamikaj soldatoj, estis forkondukata de ili en fremdan landon (Ps 137:3). Li kolere pri ili. Precipe tiam, kiam ili devigis lin kanti himnojn: "Kantu al ni el la kantoj de Cion". La sentoj de tiu ĉi ofendita homo transiris sur aliulojn. Li memoris, ke la filoj de Edom ne helpis al siaj hebreaj fratoj dum la invado de Babel (Ob 11,12). Ili instigis la babelajn soldatojn detrui la templon, dirante: "Neniigu ĝin, neniigu ĝin". Kaj tiu ĉi hebreo kolere kaj amare preĝas kun larmoj, ĉar li memoris Cionon: "Ho ruinigema filino de Babel! Bone estos al tiu, kiu repagos al vi por la faro, kiun vi faras al ni". Kaj la Eternulo diris: "Mi pereigos ja la saĝulojn ĉe Edom kaj la prudenton sur la monto de Esav" (Ob 8,9). Kaj iusence tiuj vortoj estos efektivitaj, ĉar la samajn vortojn ni renkontas ankaŭ en Apokalipso 18:8,21, kie ili rilatas al tio, kio okazos al Babelo. Ĝiaj spiritaj infanoj estos frakasitaj kontraŭ roko-Kristo ĉe lia reveno. Li frakosas homojn, forkondukatajn de Babelo, kiuj ne obeas al li.

Tiuj ĉi psalmoj estas siaspece alvoko al ni. Ili montras, kiel niaj fratoj, kiuj vivis pli frue, elverŝis siajn animojn, koleron, dubojn, timetojn kaj feliĉon... Ili elverŝis tion al Dio, Kiu aŭdas iliajn preĝojn, Kiu kompatas *nin*, *Kiu vidas kaj scias ĉion, kio okazas en la koro de homo*. Kaj ni devas demandi, ĉu havas niaj preĝoj similajn kvalitojn? Aŭ ni glitas en la marĉon de mezkapableco, uzante la samajn ŝablonajn frazojn, la samajn malnovajn vortojn kaj temojn... kaj eĉ pli malbone – ni sentas, ke Dio vidas kaj aŭdas nur la vortojn, kiujn ni diras al Li en formala preĝo, kaj ignoras niajn realajn sentojn kaj pensojn? Li vidas kaj scias ĉion, ni diru al Li ĉion, kio estas en ni. Kaj ankaŭ ni trovos tiun ĉi miraklan resaniĝon de kolero kaj malbono.

NIAJ VORTOJ

Paŭlo dufoje certigas siajn legantojn, ke li diras la veron, ĉar li diras antaŭ Dio (2 Kor 2:17; 12:19). La fakto, ke Dio ĉeestas ĉie pere de Sia Sankta Spirito, ke Li estas ĉioscianta, devigas nin esti almenaŭ sinceraj. En la juĝa tago Izrael scios, ke Dio aŭdis ĉiun ilian vorton. Kaj se ni kredas je tio, ankaŭ ni jam nune devas atenti pri niaj vortoj, ĉar per niaj vortoj ni estos pravigitaj (Jeĥ 35:12). Nin gvidas la ĉioscio de Dio, Lia kompatato gvidas homan konduton. En Jes 3:16 Li atentis eĉ pri la korplingvo de virinoj – kaj

malaprobis ilin. Tio atestas pri tio, kiel atente Dio observas homan konduton. Kaj pro tio Ĥana petas Penina-n ne esti tiel fiera, ĉar: "la Eternulo estas Dio ĉioscianta, kaj Li starigas la aferojn" (1 Sam 2:3).

Ĉar Dio vidas kaj scias absolute ĉion, ni devas agnoski, ke Li komprenas ankaŭ niajn neeldiritajn vortojn. La vortojn de pentito de Ijob (Ijob 40:5) Dio pritaksis kiel malaprobon, ĉar ili verŝajne estis diritaj por kaŝi la efektivajn sentojn de Ijob, lian supozon, ke Dio estis maljusta al li (Ijob 40:8). Sed poste, kiam Ijob sincere pentis, Dio akceptas liajn vortojn (Ijob 42:6). Tial la ĉioscio de Dio devas influi ne nur al niaj vortoj, sed ankaŭ helpi al ni esti honestaj.

MEMORANTE PRI DIO

"Memoru tion, ho Jakobo, kaj Izrael, ĉar vi estas Mia servanto; Mi kreis vin Mia servanto; vi, ho Izrael, ne estos forgesita de Mi" (Jes 44:21). Dio ĉiame memoras pri ni kaj tio devas inspiri nin ne forgesi Lin en niaj ĉiutagaj klopodoj. Konduti tiel, kvazaŭ Dio nin ne vidas, signifas, ke ni neas la ekzistadon de la Eternulo. Tiel faris Babelo, rezonante: "Neniu min vidas... mi estas, kaj ne ekzistas alia krom mi" (Jes 47:10). Ili uzis la lingvon de Dio, ŝajnigante sin, ke iliaj vojoj estas nevidataj de ajna pli alta forto. Kaj ĉiuj ni havas tiun ĉi maldecan, timigantan inklinon agi tiel.

1.3 KELKAJ MEDICINAJ ASPEKTOJ

Alkoholismo estas malvirta subeniranta spiralo, same ankaŭ kiel en *ajna alia* peko. Ĝi fariĝas kaj mense kaj fizike memdetrua. La hepato metaboligas alkoholon, sed per ĝi estas mem difektita, tiel ke trouzado de alkoholaĵoj kondukas al malsano kaj morto pro akuta hepatito. Longdaŭra misuzo de alkoholo kaŭzas cerozon de la hepato. La sanstato de la alkoholulo pli kaj pli malfortiĝas, aperas depresio, senespereco, kaj plua inklino al drinkado. Alkoholo tuj penetras en la sangon kaj iras en la cerbon, influante tie al la cerba ŝelo, kiu, siavice, influas al la memoro, konscienco, menso. Kaj ni tuj vidas la moralan problemon de alkoholismo kaj drinkado. Alkoholo kaŭzas depresion, kaj pro tio kreas multe da problemoj en la vivo de la alkoholulo, kiu trinkas alkoholaĵojn grandkvante. La alkoholulo havos seksan malfortecon kaj malfacilaĵojn por atingi orgasmon. La difektita de alkoholo hepato alkondukas al hormonaj ŝanĝoj, rezulte de kiuj la kvanto de viraj hormonoj plimalaltiĝas ĝis 50%. Ĉe virinoj la difektita de alkoholo hepato plu ne transformas oestrogenon al oestradiolo, kio kondukas al ĉeso de la menstrua funkcio kaj al diversaj vaginaj malsanoj. Oftaj humorŝanĝoj de la alkoholulo rezultigas vortajn kaj peragajn ofendojn, pri kiuj li neniam pensas, estante malebria. Alkoholo bone solviĝas en akvo kaj oleoj kaj pro tio ĝi facile eniĝas en la nervajn ĉelojn. Tio kondukas al malbona konduto de alkoholuloj kaj al rompo de la familiaj rilatoj. Kaj certe, ofte aperas problemoj pri mono. Alkoholuloj malŝparas multe da mono por aĉeti alkoholaĵojn, li komencas senkaŭze foresti en la laborejo kaj riskas perdi sian laborlokon. Tiu ĉi danĝero ofte staras antaŭ la familio, en kiu estas alkoholulo. La alkoholulo daŭrigas sian drinkadon, kulpigante la familion kaj siajn amikojn, kiujn li iufoje penas eviti. "Ĉar alkoholo enhavas superflujajn por organismo kaloriojn, ĝi donas la senton de varmo kaj sateco, tial la alkoholulo ignoras manĝaĵon" (4), kaj tiel la peka rondo de memneniigo daŭras plue. Regula kaj plenvalora manĝaĵo estas fidinda vojo por helpi al li aŭ ŝi.

Alkoholo tre grave influas al konduto. Kvankam drinkemuloj opinias, ke alkoholo stimulas ilin, ĉar post ĝi ili bonfartas (alkoholo penetras en la sangon kaj rapide penetras en la cerbon), sed fakte ĝi elvokas depresion. Alkoholo subpremas socialan memkontrolon, kaj pro tio drinkemuloj diras kaj agas tiel, kiel neniam ili dirus kaj agus estante malebriaj. Ili iĝas emocie nestabilaj, facile malpacas, povas pervorte kaj perage ofendi, kaj perdas seksan sindetenon. Drinkemuloj ofte ne memoras, kion ili faris, kun kiu ili estis, kun kiu ili dormis.

Mi substrekas, ke alkoholismo plejparte estas malsano de la menso. Alkoholuloj daŭrigas drinkadon pro la rilato, kiun ili ellaboris en si mem; tial kuracado de alkoholuloj estas kunligita kun spirite-moralaj kategorioj. Alkoholuloj ne povas konfidi al si mem, al siaj pensoj, sentoj aŭ al plej bonaj intencoj. Ili konvinkas sin, ke ili eltrinkos nur iomete, sed tio finiĝas per ebrieco. Alkohola dependeco, la ĉiama deziro drinki faras alkoholulon egocentra; ĉiuj ceteraj homoj iĝas por li nur aĵoj, kiujn necesas lerte gvidi

por havi eblecon drinki. Tio estas malsano, kiu rezultigas ardan deziron drinki malgraŭ ĉio. Strange, nia kulturo laŭdegas adoradon al la memo: mensogadon por akiri bonajn kontraktojn oni opinias lerta; superfluecon de vestaĵoj, manĝaĵo, loĝejoj – ĉio tio estas konsiderata kiel signoj de prospero. Arda pasio al mono kaj obseda entuziasmo en la laborejo estas partoj de la kapitalista revo. Kaj fidi al pli alta potenco, sciante, ke mi mem ne kapablas ion ajn ŝanĝi, estas konsiderata kiel malforteco. Sed la memtrompo, la sin trudanta ideo, ke vi mem povas en ĉiu momento ŝanĝi vian konduton – tiuj estas distingaj signoj de alkoholismo. La doktrino de Jesuo, la vero de la Evangelio, decmaniere komprenita, estas radikala ilo por venki alkoholismon.

Alkoholuloj ofte eĉ ne konscias, kio efektive okazas al ili. Kiam la familianoj de alkoholulo superŝutas lin per la demandoj: "Ĉu vi estas stulta?"... Kial vi ne povas diri "ne"? ... "Kial vi ne zorgas pri vi mem?" – la alkoholulo komprenas la justecon de tiuj ĉi demandoj, sed lia menso devigas lin nei ĉion. Kaj pli kaj pli li malproksimiĝas de siaj parencoj, infanoj, amikoj. Liaj pensoj estas direktitaj nur al la akiro kaj uzo de alkoholo. Li detruigas korpe kaj mense. Sed al tiu momento la sento de sia digno eĉ la alkoholulo estas en tia malalta nivelo, ke tio jam ne havas gravan signifon por li. Sed se alkoholulo sukcesas venki la stadion de ĉioneado, li kapablas kompreni, kian grandan emfazon la Biblio faras al la valoro de la homa persono – tio efikas sur la alkoholulo kun plena forto.

En la analizo de la sango de iu ajn alkoholulo, kiam li estas sobra, estas nenioj signoj de malsano, kiel estas, ekzemple, en la sango de narkotaĵemuloj. Sed kiel kun ajna narkotaĵo, ju pli da alkoholo vi eltrinkas, des pli forte la organismo alkutimiĝas al alkoholo, kaj des pli multe da alkoholo bezonas la organismo por atingi la antaŭan efekton de malstreĉiĝo, pozitivajn sentojn ktp. Jen kial oni ne povas diri: "Mi povas eltrinki multe da vino sen malutilo por mi!" La homo, kiu diras tiel, rapide direktiĝas al tragedia kaj kompatinda memdetruigo. Pro tio, ke alkoholo estas eltrinkata ĉiame, la organismo iĝas pli kaj pli dependa de ĝi. Tio estas reakcio je pekado. La organismo bezonas novan kaj novan porcion da alkoholaĵo. Rezulte, alkoholuloj preskaŭ ĉiam troviĝas en la stato de ebriiĝo. Drinkado ĉesas esti afero sociala; la alkoholulo komencas drinki sole. Se narkotaĵemuloj, eĉ havantaj fortan dependecon, ĉesas akcepti narkotaĵojn, eĉ tian, kiel heroino, en ili restas gravaj, sed nedanĝeraj por la vivo, signoj de dependeco al narkotaĵoj. Kun alkoholo – male. Profesiuloj observis grupon da alkoholuloj, kiuj ĉesis trinki alkoholon. Ekde 8% ĝis 24% da alkoholuloj, kiuj subite ĉesas drinki, tre rapide mortas (5). Ili mortigas sin por vivi. Mi mencias pri tio tial, ke ĝuste pro tio estas sensence kribi al tiaj homoj: "Ĉesu drinki senprokraste, tute, tuj!!!" – precipe se ili troviĝas en loĝlokoj, malproksimaj de medicina helpo. Por tia persono, subita ĉeso de drinkado povas alkonduki al morto. Se vi efektive intencas devigi la alkoholulon ĉesi drinki, vi devas garantii, ke profesia helpo al li estas organizita en deca grado. Rigardu al homoj, kiuj iam feliĉe edziĝis kaj prosperis – nun ili paŝas, apogante sin al muroj, ili balanciĝas, ekkrias pro ŝajna danĝero; rigardu al virinoj, kiuj krias dum taga dormo kaj estas konvinkitaj, ke io rampas laŭ tuta ilia haŭto... Tio povas esti sufiĉa por promesi, ke oni mem neniam plu drinkos, kaj neniam proponos alkoholaĵon al homo, pri kiu oni ne multe scias. Praktike estas malmulte da ŝancoj por eviti similan traŭmon. Tion necesas travivi. Ĝuste tio necesas por purigi la organismon de alkoholo. Tio estas pli malfacile ol postuli, ke la alkoholulo ĉesu drinki "tuj". Se via alkoholulo decidis ĉesi drinki tute kaj senprokraste, la rezulto por li aŭ ŝi povos esti tiel detruiga kaj drama, ke vi, verŝajne, estos terurigitaj. Estas dezirinde, ke apude estu medicina helpo. Vi mem, povas esti, ne scios, kiel superi tion, kio povas sekvi. Reale rigardu al tio, kion oni povas atendi de la alkoholulo. Penu serĉi bezonatan profesion helpon.

GENETIKO

Laŭ observoj alkoholismon oni povas ricevi herede. Tiun konkludon oni povas miskompreni. En tiu okazo la alkoholulo pravigas sian pekon per tio, ke la malsano ne dependas de li, ke li estas senhelpa viktimo de siaj antaŭuloj. La psikologio de alkoholismo serĉas pravigon por si. Do, la alkoholulo havas tendencon apogi sin al tiu genetika argumento. Rusaj alkoholuloj ofte diras al mi, ke alkoholismo troviĝas en la rusa sango. La familianoj de la alkoholulo devas esti kapablaj pruvi, ke ili ne estas alkoholuloj; kaj Dio ne tiel severe kondannos konduton, kiu estas neevitebla. Ne estas tia nocio kiel "neevitebla pekulo". Ni ne estas mekanismoj, regataj de genoj. Ateista mondo havas nek sencon, nek ordon, nek celon. Se

alkoholismo estus enmetita en nin genetike, iuj homoj kapablus drinkadi neniam iĝante alkoholuloj. Tio certe estas nebla. Ni – individuoj, unikaĵoj, kreitaj de la Patro por Li glori Sin en ni. Ni estas parto de la grandega plano de Dio. En Kristo ni iĝas nova kreitaĵo (2 Kor 5:17). La alkoholulo bezonas novan vivon, pli "altan forton", kiel nomas tion "Anonimaj Alkoholuloj"; kaj tio eblas nur en Kristo. Ĝuste tiel venkas Paŭlo: "Jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj sin donis pro mi." (Gal 2:20,21).

Ni estas iusence prenitaj de Adam kaj baptitaj en Kriston. Ni estas apartigitaj de la mondo kaj kondukitaj en la regnon de la Filo de Dio. "Vi cirkumcidiĝis per cirkumcido ne manfarita, en la demeto de la korpo de la karno, en la cirkumcido de Kristo". "La karno" de kredanto estas demetita per Kristo de la mondo dum baptiĝo: "...enterigite kun li en bapto, en kiu ankaŭ vi estas kunlevitaj per la fido al la energio de Dio, kiu nin levis el la mortintoj. Kaj vin, kiuj estis malvivaj per viaj eraroj kaj la necirkumcido de via karno, Li vivigis kun li, pardoninte al ni ĉiujn erarojn" (Kol 2:11-13). Daŭrigi la vivon de alkoholulo signifas kontraŭstari al tio, kion serĉas la Sinjoro Jesuo. En la karno ni ne povas plaĉi al Dio. Pro tio ni estis "cirkumciditaj" en la perfekta sindono de Kristo, kaj ni aliĝas al tio pere de nia baptiĝo. Ni devas kalkuli nin "mortintoj" al peko, se ni baptiĝis (Rom 6:11), sed ĉiama ebriiĝo malhelpas atingi tiun rezulton. Vivante en peko, la alkoholulo detruas sin mem, sed ne siajn rilatojn kun Dio kaj kun la Filo. Frato en Kristo ĉiam estas frato, almenaŭ, kiel ni povas opini. Pro ĉiuj tiuj kialoj mi tutkore rekomendas al la familianoj de nekredanta alkoholulo trovi tempon kaj lokon por prediki al li aŭ ŝi tiujn ĉi mirindajn doktrinojn. Ĉar nur en la vero, en la realeco de Kristo, en la konkreta Espero por la Regno, en la Espero relate al Izrael... Sole en tio estas tiu "alta potenco", kiu povas tute aliformigi vivon. Jen kial mi ne kontraŭas al la bapto de konfesiita alkoholulo. Ja se ili serĉas helpon de Dio por venki siajn problemojn, al mi ŝajnas, ke tion oni povas konsideri, kiel gravan parton de ilia resaniĝo. Tiel multaj alkoholuloj agnoskas, ke Dio ekzistas. Preskaŭ ĉiuj ili diras, ke ili kredas je Dio kaj deziras respondi al Lia voko. Tamen ĉiuj ili ne sufiĉe taksas la gloron kaj la povon de Dio. Kaj ni devas denove kaj denove instrui al ili pri Li. Li ne estas ideo, ne estas produkto de kulturo, al kiu mankas potenco. Li estas reala. Li estas ĉie. Li atentis pri la vivoj de Sijaj infanoj.

PLIDETALA STUDIO

Ĉar ni estas kreitaj de Dio, ni devas esti dediĉitaj al Lia servo (Mt 22:19-21). "Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas" (Ps 100:3). Ni devas reale aparteni al Li, ĉar Li nin kreis. Ni kredas je kreado, ne je evoluo; kaj tiu ĉi kredo devas voki nin dediĉi nian vivon al Dio. Dio kreis homon laŭ Sia bildo; tial ni devas ne malbeni homojn (Jak 3:9). Pro tio, ke ĉiuj homoj estas kreitaj laŭ la bildo de Dio, ni devas rilati al ĉiuj homoj tiel, kiel ni rilatus al Dio. Ni devas ne rilati al iuj homoj kiel al bestoj, neportantaj la bildon de Dio. Ni devas ne mortigi aliajn homojn (Gen 9:6). Kaj Jakobo diras la saman. Ja malbeni homon signifas preskaŭ la saman, ke mortigi lin. En tio estas la esenco de la aludo de Jakobo al Genezo. Ni devas respekti ĉiun homon simple pro tio, ke li estas kreita laŭ la bildo kaj simileco de Dio.

ATENTU PRI VIA KONDUTO

En Ps 94:9,10 estas dirite, ke malsaĝulo, kiu volas aspekti saĝa, devas atenti sian konduton: "Ĉu ne aŭdas Tiu, kiu aranĝis orelon? Ĉu ne vidas Tiu, kiu kreis okulon? Ĉu ne punas la ĝustiganto de la popoloj, kiu instruas al homo scion?". Kompreno de tio, ke Dio efektive estas nia persona kreinto, kondukos nin al la kompreno, ke Li vidas kaj scias ĉion. Tiuj ĉi gravaj principoj alvokas nin vivi kaj paroli kun la scio, ke ĉio okazas en la ĉeesto de nia Kreinto. Ni rememoru, ke kompreno de la povo kaj naturo de Dio alkondukis Ijobon al pento. Ne sufiĉas pasive agnoski tion. "Viaj manoj min kreis kaj fortikigis; prudentigu min, kaj mi lernu Viajn ordonojn" (Ps 119:73). David komprenis: ĝuste pro tio, ke li estis kreita laŭ la bildo kaj simileco de Dio, li devas spirite perfektigi; tiel li serĉis fortojn por esti obeema al Dio.

LABORO

Dio antaŭdifinis laboron kiel rimedon al partnereco kun Li kaj al nia memplenumo laŭ Lia intenco. Laboro ne estas kunigebla kun la spirito de maldiligento, kiun sugestas alkoholo. Laboro en ĉiu formo estis antaŭdifinita de Dio de la komenco mem.

VALORECO DE HOMOJ

Nur tiuj, kiuj kredas, ke ni estas kreitaj de Dio, kaj havas eblecon esti pardonitaj, povas konscii la valorecon de homoj. Nur ili povas kompreni, ke ni estas ne simplaj bestoj, nur ili povas miri pri la homa vivo, kiu inspiras nin savi homojn per predikado de la Evangelio. John Skott komentis: "Kiam homoj estas senvalorigitaj, ĉio en la socio iĝas senkolora. Virinojn kaj infanojn oni malestimas; malsanulon oni opinias malagrable, kaj maljunulon kiel ŝarĝodevo, naciajn minoritatojn oni diskriminacias; kapitalismo montras sian monstran vizaĝon; infanoj estas ekspluatataj en la minejoj kaj fabrikoj; krimuloj krueliĝas en malliberejoj; ĉiujn kontraŭdirojn oni sufokas; estas inventitaj Belsen kaj Gulago; nekredantoj estas lasitaj por morti. Havante nek liberon, nek respekton kaj feliĉon, homa vivo ŝajnas senvalora, ĉar en ĝi restis nenio homa. Sed kiam homojn oni respektas laŭ ilia propra valoro, ĉio ŝanĝiĝas: virinojn kaj infanojn oni respektas, pri malsanuloj kaj olduloj oni zorgas, disidentojn oni aŭskultas, al malliberuloj oni donas ŝancon de pli bona vivo, naciaj minoritatoj estas defenditaj, laboristoj ricevas justan salajron kaj havas konvenajn loĝkondiĉojn, kaj la Evangelio estas akceptata en ĉiuj partoj de la mondo. Kial? Ĉar homoj havas valoron, ĉar ĉiu viro, virino kaj infano havas signifon, kiel homo kreita laŭ la bildo kaj simileco de Dio".

1.4 KULPECO

La vivo de alkoholuloj konsistas el sensukcesaj provoj deiri de alkoholismo. Ili ofte ricevas kuracadon dekfoje, eĉ pli, ili bedaŭras ĉiun drinkadon, kaj promesas al si mem, ke tio neniam ripetiĝos. Tio kaŭzas profundan senton de kulpeco kaj persona malsukceso. Multaj alkoholuloj komprenas, ke ilia konduto estas malĝusta. Precipe akre pro tio suferas alkoholuloj-kristanoj. La konflikto inter ilia kredo kaj ilia konduto iĝas neeltenebla, kaj ebrieco estas facila vojo por forgesi tiun komprenon. Enketado montris, ke "48% de la baptista komunumo trinkas alkoholaĵojn. Sed estas interese rimarki, ke 18% da ili iĝas alkoholuloj. La kialo estas verŝajna kulpeco... ĉar ili suferas pro pli forta kulpsento, kiam ili trinkas alkoholaĵon" (6).

La sento de kulpo devigas la alkoholulon percepti sin mem malpura kaj malbela. Sendepende de tio, ke virino-alkoholulino zorge plibeligas sian vizaĝon per kosmetikaĵoj, tutegale, ŝi scias, ke ŝia vizaĝo aspektas marasme. La sento de kulpo estas parto da malvirta descendanta spiralo. La alkoholulo scias, ke li aŭ ŝi aliigas la Dian bildon, laŭ kiu ili estas kreitaj. Tio dependas de la nivelo de ilia konscienco – kaj des pli, se ili estas kristanoj.

1.5 LA NATURO DE PEKO KAJ TENTO

Nun ni parolos pri la vera kristana kompreno pri la vorto "diablo". Certe ekzistas nek drako, nek homo, nomata la diablo, kiu respondecas pri viaj tentoj, nek anĝelo, falinta de sur la 99-a etaĝo kaj atendanta momenton de via malforteco. La fonto de tento troviĝas en nia propra animo, en nia propra koro, kiel diras la Biblio. Ekzistas erara supozo, ke satano estas reala persono. "Ekzistas nenio, kio, enirante en homon de ekstere, povas lin profani". (Mk 7:15, 21-23). Nenio malpurigas homon de ekstere – nek alkoholo, nek heroino. Peko eliras "el la koro de homo". Homa opinio estas spaco por spirita batalo.

Peko laŭ sia naturo havas tendencon posedi la homan vivon. Kaj ju plu, des pli. Vin, varŝajne, konvikis la propra sperto. Pekinte unuafonon, vi profunde ŝokiĝas pro la rezulto, kaj pentas antaŭ Dio. Ripetante peki, la pentosento iĝas pli kaj pli malforta. Se vi daŭrigos peki denove kaj denove – tio iĝos via vivmaniero. Ĉe alkoholuloj kaj narkotaĵemuloj tio elmontriĝas fizike. Tia pasio postulas pli kaj pli da alkoholo. La malsano progresas, progresas ankaŭ peko. La korpo de la alkoholulo ŝanĝiĝas. Ŝanĝiĝas ankaŭ la spirito,

kaj celado kontentigi la karnon superas. Mi vidas en tio iun interligon kun homoseksualismo. Neniu naskiĝas gejo. Tamen ĉiame pekante, memseksemuloj ŝanĝiĝas psike kaj fizike, kaj tio allogas al ili personojn de ilia sekso. Sed tio ankaŭ estas peko. Ankaŭ ili bezonas helpon, kvankam ili kontraŭstaras al la vorto de Dio, Kiu abomenas tiujn ŝanĝojn, kiuj okazas en ili.

ALKOHOLISMO: ENKORPIĜO DE PEKO?

La bone konata malsupreniĝo en alkoholismon, kiun ĉiu socio vidis en kelkaj siaj membroj estas eble la epitomo de peko. Vino estas simbolo de kelkaj aferoj, sed en la fina libro de la Biblio ĝi aperas kiel definitiva simbolo de peko (Ap 14:8,10; 16:9; 17:2; 18:3). Alkoholo "...mordas kiel serpento kaj pikas kiel vipuro" (Sent 23:29-31). Serpento estas enkorpigo de peko; la ruzeco de la serpento estas montrita en tio, kiel alkoholuloj lerte elpensas rimedojn por atingi sian celon – eldrinki. Vino kaj ebrieco estas uzataj figure por montri, ke Dio malaprobas tion (Jer 13:9-14; 48:26). Ebrieco iĝas puno: homo fizike kaj mense iĝas alkoholulo, ĉar tio estas konfirmo de Dio, ke homo estas pekulo. Analoge, se homo konscie rifuzas akcepti la Biblion, Dio sendas al li fortan misopinion kaj la homo ne povas trovi la veran vojon (2 Tes 2:10).

MALVERA CITADO DE LA BIBLIO

La priskribo de la tentoj de la Sinjoro en la dezerto montras al ni, kiel agas la "satano" de la homa menso. Ni povas eĉ citi la Sanktan Skribon por pravigi nian pekon. En diskutoj kristanoj-alkoholuloj, se ili verdiras, ili ofte konfesas pri misuzo de Bibliaj tekstoj por pravigi sian ebriecon. Se vi estas entiritaj en diskuton pri tio, kion la Biblio diras pri uzo de vino en pozitiva senco, sekvaj linioj povas esti utilaj por vi:

- En la Bibliaj tempoj alkoholaĵoj ne estis tute tiaj, kiaj ili estas en nia tempo. La kvanto de metodoj de distilado estis limigita; oni ne trinkis malvarmigitan vinon; por vino oni uzis nur porozajn ujojn, kiuj helpis al aero interagi kun fermentoj de vino; fermoplatoj ne fermis vinon hermetike. Alkoholaĵo povas esti distilita en forta formo nur se aero ne kontaktas kun ĝi. Se estus pli ol 10% da alkoholo, la vino vinagriĝus. La pli multe da drinkaĵoj, plej verŝajne, havis nur 2% da alkoholo (7). Vinon oni ofte produktis per boligado, dum kiu alkoholo vaporiĝis, kaj se estis aldonita akvo, oni ricevis specon de kordialo. Ili estis do agrablaj trinkaĵoj, sed nur ofta kaj grandskala uzado kondukis al misuzo. En grandaj kvantoj vino estis neatingebla – kiam en Kanna la vino finiĝis, aperis problemo, kie akiri ankoraŭ da vino? Vino estis farata ne en fabrikaj kondiĉoj, vinoj estis malfortaj, kompare kun la nuntempaj, kiuj havas ĝis 20% da alkoholo, aŭ similaj al vodko – 40% aŭ eĉ ankoraŭ pli multe.

- La Biblio diras pri vino por ilustru iujn vortojn, sed ebriecon la Biblio neniam pravigas.

- En Ps 104:14,15 estas dirite, ke "la vino gajigas la koron de la homo". Tiu ĉi frazo en la kunteksto rilatas al tio, ke bona rikolto ĉiam ĝojigas homojn, kiuj rikoltas ĝin.

2. KOMPREENO DE VIA RESPONDO

2.1 ENKONDUKO

Same kiel alkoholulo ĉesas kompreni sin mem, tiel ankaŭ lia familio kaj geamikoj fariĝas simile konfuzitaj. Ili ne scias, kia devas esti ilia respondo. Ili ne komprenas, kial tio okazas. Ilin turmentas la demando – ĉu ili mem kulpas pri tio, kio okazis. Ili ofte embarasiĝas kaj ne scias, al kiu ili povas konfidi siajn problemojn. Ili devas rigardi sin kiel parto de granda bildo... Ekzemple, la virino, kiu loĝas en loĝejo № 42, de domo № 98 en Nevskij-prospekto... Ŝia edzo estas alkoholulo, ŝi ne havas monon por pripagi ĉi-monatan fakturon, aĉeti vestaĵojn por infanoj, super ŝi pendas ĉiama minaco, ke la edzo perdos

sian laborlokon. Li batas ŝin... Ŝi devas rigardi sin de ekstere. Tiuj, kiuj loĝas kun alkoholulo, ofte koleras kontraŭ ili. Sed en Lev 19:17 ni legas: "Ne malamu vian fraton en via koro: admonu vian proksimulon, por ke vi ne portu sur vi pekon pro li." Alivorte, se ni ne admonas nian proksimulon ni fine malamos lin.

2.2 NEADO

Ni komencu per rakonto. Patrino kaj ŝia filo loĝis en unuĉambra loĝejo kune kun granda elefanto. La elefanto estis tiel granda, ke ĝi okupis pli grandan parton de la ĉambro, kaj ili kun malfacilo povis trairi preter ĝi. La elefanto tiel laŭte snufadis, ke se iu telefonis al ili, ili ne povis aŭdi, kion oni diris al ili. Tutan sian monsumon ili elspezis por manĝigi la elefanton. Ili havis ĉiaman timon, ke iutage la elefanto ekstaros kaj trabatos la plafonon kaj la najbaroj desupraĵ falos al iliaj kapoj. Gastojn en sia loĝejo ili ne povis akcepti. Kiam la elefanto dormis, ĉio ŝajnis ne tiel malbona. La patrino ofte parolis al la filo: "Parolu al neni pri la elefanto". Kaj li, obeante, parolis pri la elefanto al neni. Kiam la elefanto dormis, li, ŝajnigante, ke la elefanto ne estas ĉi tie, kovris ĝin per litkovriloj, por ke liaj alvenintaj kamaradoj ne povu vidi la elefanton. La patrino kaj la filo timis, ke iu ekscios, ke ĉe ili loĝas la elefanto, kaj konsideros ilin ambaŭ frenezaj. Dum noktoj iliaj fenestroj estis zorge ŝirmitaj. Ili senprokraste ĉesis telefonparoli, se la elefanto komencis snufi. Ilia vivo daŭris en ĉiama timo, ke ĉiuj ekscios, ke ĉe ili loĝas elefanto. Sed ĉiuj jam sciis tion! Sed pasis multe da tempo antaŭ ol la patrino kaj la filo komprenis, ke ĉiuj jam scias, ke en ilia ĉambro loĝas elefanto! Tio similas al situacio, kiam en familio estas alkoholulo. Neniu devas scii pri tio. La familianoj penas sekretigi tion, kaj tiu ĉi sin trudanta ideo ŝirmas de ili realajn faktojn kaj rompas interrilatojn kun aliaj homoj. Pro agoj de la alkoholulo suferas ĉiuj liaj familianoj. Tio devas tiel ne daŭri. Volforto kaj realaj agoj helpas decidi tiun ĉi problemon. Ekkonscio de tio, ke en via ĉambro loĝas grandega, peza kaj reala elefanto, estos la komenco de solvo de la problemo.

2.3 HELPI AŬ DONI POVECON?

Alkoholuloj bezonas helpon. Sed helpi, en tiu ĉi kunteksto signifas fari por ili ion tion, kion ili ne povas fari memstare. Multaj el tiuj, kiuj loĝas kune kun alkoholuloj fariĝas tiel obseditaj pri la alkoholulo kaj pri la asociitaj problemoj, kiel la alkoholuloj estas pri alkoholo. Estas facile vidi helpon kiel permeson al alkoholuloj daŭrigi ilian drinkadon.

La subaj demandoj helpas difini la diferencon inter helpo kaj permeso al alkoholuloj drinkadi:

1. Ĉu vi iam ajn diris, ekzemple al lia dunganto, ke la alkoholulo iom malsanas?
2. Ĉu vi iam prenis parton de la kulpo pro lia/ŝia konduto?
3. Ĉu vi evitis paroli pri lia/ŝia ebrieco pro timo nebonvena respondo?
4. Ĉu vi pagis por revenigi lin/ŝin el malliberejo liajn/ŝiajn leĝajn ŝuldojn?
5. Ĉu vi pripagis liajn/ŝiajn fakturojn?
6. Ĉu vi pruntedonis monon al alkoholuloj?
7. Ĉu vi provis drinki kun li/ŝi, esperante fortikigi viajn rilatojn?
8. Ĉu vi donis al li/ŝi, fojon post fojo, "la lastan ŝancon", kiu, certe, estis ne la lasta? Ĉi okaze via kredebleco kun li/ŝi pli kaj pli malfortiĝas.
9. Ĉu minacis vi, ke vi forveturos kaj poste ne plenumis vian minacon?
10. Ĉu vi kompletigis laboron aŭ proekton, kiun la alkoholulo ne finis memstare?

Ĉiuj supreligitaj punktoj ebligas al la alkoholulo daŭrigi drinkadon, ne venki la pereigan kutimon. Tio estas kialo, ke 90% da alkoholuloj havas laborlokon (8). La familianoj kaj amikoj protektas ilin de fina katastrofo, kaj ili daŭre stumblas en sia senespera ekzisto.

Amo protektas; tion ni scias el 1 Kor 13. Kaj vera amo neniam publike humiligas. Sed aliflanke, kiam temas pri ĥronika alkoholismo, kaŝi la problemon estas senutile. Simile al la elefanto, pri kiu ni parolis pli supre, "la sekreto" tiel aŭ aliel iĝos sciata de ĉiuj. Vi mem, estante en la reto de mensogoj, iom post iom fariĝas tuŝita de la malsano de alkoholismo. Ni substrekis en la komenco, ke la ĉefa trajto de tiu ĉi

malsano estas memtrompo; la alkoholulo ne kredas, ke li suferas de la malsano. Se vi mensogas al vi mem, al aliaj homoj, tio rezulte povas iĝi trajto de via karaktero. Por vivi en la vero, en Kristo, ni devas ne mensogi, nek trompi. Necesas alfrontigi la alkoholulon kun tiu fakto. Rilate al Izrael por trakti ilian pekon Dio uzis apartiĝon de ili. Li allasis ilin trafi katastrofon. La provo mildigi la katastrofon estas senutila. Ĉiu alkoholulo fine devos alfronti sian problemon, sola antaŭ sia Kreinto. Nia amo devigas nin ne dormi nokte, atendante la alkoholulon, kiu drinkas ie ekster la hejmo. Sed vi, ekzemple, anstataŭ atendi lian ebrian revenon povas tranokti aliloke, kaj lasi amantan noton, klarigante vian foriron. Ni devas ankaŭ agnoski la fakton, ke tiuj, kiuj loĝas kune kun la alkoholulo bezonas tiel multe da subteno, kiel la alkoholulo mem.

Dio atentis pri Siaj malobeemaj infanoj, kiuj lasis la veran vojon de la plano de Dio. Sed la plano de Dio povas ŝanĝiĝi laŭ la postuloj de graco kaj kompatado. Tiuj, kiuj loĝas kun alkoholuloj, ofte estas nesinsekvaj en siaj agoj, havas ŝanĝeman konduton. Jen ili krias al la alkoholulo, minacante al li pri divorĉo, jen en la sekva momento kun kompatado ili savas lin de sekvo de la lasta eldrinko, trovante diversajn pravigojn kaj tiel plu. Ili volonte aŭskultas ankoraŭ unu promeson ne drinki, malgraŭ la multaj antaŭaj neplenumitaj promesoj. Dio aliel rilatas al ripetitaj pekoj. Fine Li agas decide. Mi substrekas, ke tie ĉi temas pri alkoholismo, ne pri laŭokaza ebriiĝo. Dio en Sia amo apartigas Sin de la obstina pekanto. Pri tio ni nun parolos pli detale.

2.4 APARTIĜO

Por eltiri la alkoholulon el la neado kaj helpi lin al venko, necesas enmiksiĝi en lian vivon same, kiel Dio enmiksiĝas en niajn senesperajn vivojn por alkonduki nin al Si. Tamen tiu radikala enmiksiĝo en la vivon de alkoholuloj ofte devas preni la formon de apartiĝo de ili. Agante tiel, ni montras la amon al Dio, demonstritan al ni sur la kruco. Li ne donis Sian filon en kolero kontraŭ ni. La ago de Jesuo estis lia memofero zorge planita. Tio estas ekzemplo por la kristana familio, kiu devas apartiĝi de membro-alkoholulo.

Alkoholismo estas peko. Ni rigardu en la okulojn de la vero. En la ĉirkaŭanta nin mondo homoj provas plimaltigi la signifon de tiu ĉi peko, precipe en la lasta jarcento. Alkoholismo progresis de la nivelo de peko ĝis psikologia problemoj, kaj nun al nura mensa malsano. Sed alkoholismo estas peko, sendepende de iaj psikologiaj problemoj, kiujn ĝi kaŭzas. Kompreno de tio helpas al la kristana alkoholulo vidi la aferon de perspektivo, nebla al nekredanta homo. Sed kiel Dio traktas kutiman pekon? Li vidis multe da pekaj agoj de Izrael – homoj kapriĉaj, kulpaĵoj pri adultoj. Tragike estas, ke ni nuntempe pekas ne malpli, ol ili. Kiam Izrael fordonis sin al peko, ĝi iĝis simila al alkoholulo, perdinta sian respondecon antaŭ Dio pro forta ebrieco. Kion do Dio faris responde? Li ne diris: "Nu, Izrael, tio estas la fino de niaj interrilatoj, Mi volas havi kun vi nenion komunan, foriru, vi neniam plu vidos Min". Ĉu Dio forpuŝis Sian popolon? Ne prene! (Rom 11:1,2). Li havis deziron neniigi ilin ĉiujn kaj fari novan komencon (El 33,34) – sed tion Li neniam efektivigis. Laŭ Hosea, Li similis al forlasita amato, al homo edziĝinta kun virino, kiu estas malĉastino. Li malĝojis pro ilia agado. Li amis ilin tutkore. Li sendis al ili Siajn servantojn kaj poste eĉ Sian filon por alvoki ilin al Si (Mt 21:33-38), kvankam Li sciis, ke ili fordonos Lian amatan filon al morto. Manifestante la Patron, Jesuo ploris pri Jerusalemo, tutkore dezirante, ke la popolo revenu al la Patro: "Ho Jerusalemo, Jerusalemo..." (Mt 23:37). La parabolo pri la perdita kaj trovita filo unuavice diras pri la Patro, kiu atendas, ke Izrael revenos al Li el la irado en la pagana mondo.

Tamen estas alia atesto en la Biblio, ke Dio apartigis Sin de Izrael. Ne pro tio, ke Li timis, ke ili makulos Lin, kolerigos Lin aŭ pro tio, ke Li hontis pro ili. La amo de Dio superas ĉion tion. Li neniam forlasos ilin. Sed kial Li apartiĝis de ili? Nur por ilia bono. La Biblio atestas tion:

- Dio elverŝis sur Izraelon Sian koleron kaj forlasis ilin por purigi ilin (Jeh 22:20-22). En Lia apartiĝo estas klara intenco kaj celo;

- Dio forlasis ilin, por ke malkaŝiĝu ilia pekeco – Li ne volis plu ŝirmi iliajn malbonajn agojn antaŭ la okuloj de la pagana mondo (Jeh 23;29);
- Jesaja montras, ke Dio forlasis Sian popolon por ke la vorto de la Eternulo atingu ilin (Jes 2:5,6). Kaj Li tutkore deziris ilian revenon;
- Dio forlasis Sian popolon, por ke ĝi turnu sin al Li (Amos 5:2,4);
- Dio forlasis Sian popolon *ĝis kiam ili ekkonsciis, ke iliaj problemoj aperis pro tio, ke Li ne estas kun ili* (Read 31:17);
- En 2 Kroniko 12:5,6 ni legas, ke Dio forlasis Izraelon, forlasis ilin en la manoj de Ŝiŝak, sed pro tio ili humiliĝis, kaj Li revenis al ili;
- Li forlasis Jeĥezkelon por *Jeĥezkel mem* ekvidu, kion li havas en sia koro – Dio tion, certe, sciis. (2 Kron 32:31).
- En Neh 9:28,31 estas skribite: "Vi forlasis ilin en la manoj de iliaj malamiko, kiuj regis super ili. Sed kiam ili returnis sin kaj vokis al Vi, Vi aŭdis el la ĉielo, kaj Vi savis ilin multfoje pro Via granda kompatemeco". Dio forlasis Izraelon, sed kiam la popolo alvokis Lin, Li ekaŭdis ilian lamentojn kaj revenis al ili. Finrezulte Li neniam forlasis ilin dank' al Sia kompatemo kaj karitato. Ekzemple, Ciono sentas sin forlasita de Dio, sed reale tio ne estis tiel (Is 49:14). Tio nur ŝajnas, ke Dio por momento malatentis ŝin (Is 54:6,7).

Ĉio tio estas ekzemplo por ni. Sufiĉe malfacile estas apartiĝi de alkoholulo-familiano kun la samaj puraj motivoj, kiujn havas Dio. Vi estas animvunditaj, oni ofendis vin, al vi ŝajnas, ke oni vin eluzas... sed ĝuste en tiaj situacioj maksimume elmontriĝas vera amo. Eĉ se ni estas devigitaj forlasi, ni devas zorgi neniam fordoni esperon pri resaniĝo. Ĉar Dio same neniam forlasis nin. Ni ne povas tute forlasi familiano-alkoholulon. Sed ni povas iugrade apartiĝi de li. Ĝuste en tio estas la senco kaj celo de Lia apartiĝo. Se Dio havis ĉiaman kaj aktivan interrilaton kun Sia popolo Izrael, malgraŭ la senfina vico de iliaj pekoj, malaprobaj, pentoj kaj promesoj pliboniĝi, des pli ni devas ne elmontri koleron, inciton, lacecon kaj aliajn homajn malfortaĵojn. Ĉi tie forestas iuj ajn preparitaj receptoj kaj traktitaj vojoj. La celo de tio, ke Dio forlasis tiun popolon, estas en tio, ke ili mem ekkonsciu sian konduton kaj venu al la vera pentoj, kiun Li serĉas en ili. Kaj kun doloro kaj amaro Dio faris tian paŝon.

Hoŝea priskribis la koran doloregon de Dio, dum Li tion faris: "Kiel Mi agu kun vi, ho Efraim? Kiel Mi protektu vin, ho Izrael? Ĉu Mi faru al vi, kiel al Adma? Ĉu mi egaligu vin al Ceboim? Renversiĝis en Mi Mia koro, varmegiĝis Mia tuta komparto. Mi ne agos laŭ Mia flama kolero, Mi ne plu ekstremos Efraimon; ĉar Mi estas Dio, ne homo, Mi estas Sanktulo inter vi; Mi ne venos en furiozo" (Hoŝ 11:8-9). Ĉi tie Dio promesas neniigi ilin per Sia kolero, same kiel okazis en Sodom pro la malbona konduto de la Sodomanoj, sed pro Sia amo al Sia popolo Li ne faris tion. Kaj jen ankoraŭ: "Mi forlasis Mian domon. Mi foriris de Mia heredaĵo; tion, kio estis kara por Mia animo, Mi forlasis en la manoj de ĝiaj malamiko" (Jer 12:7). Kvankam pli frue Dio promesis neniam forlasi Sian popolon (1 Reĝ 12:22; Ps 94:14), tamen Li forlasis ilin por ilia bono. Tial ne sentu vin kunligitaj kun antaŭaj promesoj al la alkoholulo, faritaj en pli frua stadio de lia alkoholismo. Sed, certe, apartiĝo devas esti nur lasta kaj ekstrema rimedo.

Estas necese apartiĝi de la alkoholulo, eble eĉ fizike forlasi lin. Sed malgraŭ via kolera sento, tio estos kordolorige. Dio scias vian doloregon kaj Li estos kun vi. Li ĉiame estas kun ni kaj direktas ĉiujn niajn vojojn kaj agojn. Tiu ĉi apartiĝo necesas kiel por vi, tiel ankaŭ por pentoj de la alkoholulo. Aliokaze, via dependeco de tiu malfortaĵo de alia homo iom po iom plifortiĝos, kaj vi ne povos plu esti sendependa filo de Dio, kaj ne estos "kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj de vorto de Dio" (Ps 1:3). Fizika disiĝo ne estas aŭtomata, nek necesa respondo, se nur la alkoholulo ne insultas vin. Penu elmontri vian amon al li, samtempe neniaokaze montru tian komparton, kiu helpas al li fortikiĝi en lia malvera vojo. Neniam permesu al vi mem deturni vin de la alkoholulo pro kolero, nur amo helpas al vi agi korekte. Klarigu al li,

kion vi faras kaj kial. Diru al li, ke vi de nun ne plu kovros antaŭ homoj lian pekan konduton. Ne donu al li monon por alkoholaĵoj, ne aĉetu vi mem alkoholaĵojn por li. Diru al li, ke vi plenumas vian devon antaŭ Dio, kaj tiu devo akre diferencas de tio, kion li petas vin fari. Klarigu al li, ke vi amas lin, ke vi sincere penas sekvi al la ĉefaj Bibliaj doktrinoj. Certigu lin, ke via apartiĝo ne estas forlaso. Vi amas lin. Atentigu lin, ke ankaŭ vi estas pekanto alimaniere; zorgu ne senti, ke vi estas pli justaj, ol li, aŭ ke vi havas pli altan pozicion antaŭ Dio nur pro tio, ke viaj pekoj ne estas malkovritaj. Rememorigu al li la version, en kiu estas dirite, ke la pekoj de unuj estas evidentaj, sed de aliaj estos malkovritaj nur dum la juĝo (1 Tim 5:24). Pri tio vi devas paroli elkore, montrante vian sinceran intereson kaj maltrankvilecon.

KONFIDU AL DIO

Konfidu al Dio, transdonu ĉion en Liajn manojn. Sed tio ne samas al foriro de la problemo. Ni ne povas ŝanĝi aliajn homojn, nek direkti ilin, kvankam ni ĉiuj posedas iom de la "komplekso de Kristo", per kiu ni opinias, ke estas sole ni, kiu povas ŝanĝi alian homon. Ni ĉagreniĝas, se ni ne sukcesas atingi tion. Sed vera amo "ne celas por si mem" (1 Kor 13:5); nia amo al la alkoholulo devas esti pura kaj devas ne esti parto de nia memamo. La memfido de Jesuo estis sendependa de tio, ke nur malmulte sincere respondis al lia agado. Li havis planon, sed neniam altrudis ĝin al aliaj. La limoj de niaj rilatoj kun la alkoholulo devas esti certaj, por ke ni ne trafu en dependecon de li, por ke tiuj rilatoj ne malbonigu nian propran personecon kaj niajn rilatojn kun Dio. Multaj homoj kunligitaj kun alkoholuloj malsukcesis ĝuste en tio. Ni devas efike trakti niajn proprajn aferojn kaj nian respondon al tio, kio okazas. Provu aranĝi certan tagordon en via domo. Tio plibonigos la situacion en via familio, permesos eviti ĥaoson kaj bonefikos al viaj infanoj. Penu ĉiutage manĝi en la sama tempo. En la sama tempo laŭplane legu la Biblion. Ĝustatempe kuŝiĝu por dormi. Laŭ via fizika kapablo ne permesu al la alkoholulo havi efikon sur ĉio tio. Legu kaj relegu la vortojn: "Detenu vin de kolero kaj forlasu furiozon; ne incitiĝu, ke vi ne faru malbonon" (Ps 37:8). En ĉiaj cirkonstancoj ni devas memori pri nia persona rilato kun Dio, kaj nia persona espero atingi la Regnon. Maltrankviliĝo estas ofta trajto de familioj, inter kiuj loĝas alkoholuloj.

Tamen, se la alkoholulo revenos el la stato de neado, antaŭ vi aperos multaj eblecoj. Estos haveblaj spertaj konsildonantoj, kaj kristanaj kaj sekularaj. Por alkoholuloj estas multe da komunumoj, ekzemple, "Anonimaj Alkoholuloj", kiu havas multajn branĉojn en la mondo. Mi konsilas al vi inviti specialiston, kiu agas laŭ la vera Evangelio, se, certe, pri tio interesiĝas la alkoholulo. Kun helpo de Dio la "malsano" estas kuracebla! Nur 15% da amerikaj alkoholuloj propravole konsentas je kuracado. La plimulto da ili ricevas kuracadon dank' al tiuj, kiuj zorgas pri ili.

2.5 PACIENCO KAJ PARDONO

Neeblas kuraci alkoholismon rapide. Atendo de rapidaj rezultoj povas senrevigi vin. Kaj tio laŭ si mem estas defio al kredo je la Dio, kiu "neniam rapidas", sed paciencas, kiel ofte diris frato John Tomas. "Silentu antaŭ la Eternulo kaj esperu al Li; ne incitiĝu, kiam sukcesas homo, kiu plenumas malbonajn intencojn" – diris David en Ps 37:7. Tion necesas atingi en ĉiu situacio. Estas necese, ke la alkoholulo sentu honton pro sia peko, sed komprenigi tion al li necesas taktoplene. Li devas kompreni, ke ni ne volas lin honti, kvankam ni komprenas lian staton. Alkoholuloj bezonas iun lokon, kien ili povus veni post reveno de la malsano, kie ili povas komenci ĉion denove. Tia "loko" povas esti manĝotablo, interparolo kun la filino aŭ edzino; tamen oni devas ne kaŝi la malsukceson aŭ etigi la gravecon de lia konduto. Priparolo de lia konduto devas esti minimuma. Oftaj memorigoj pri lia malsukceso povos esti kialo de lia "fermiĝo". Tiu loko devas esti loko de fido, konfido kaj honesteco.. Kaj vi certe devas ne rakonti pri konfesoj de la alkoholulo al aliaj homoj, precipe dum tiuj antaŭmenciitaj tempoj de senesperigo. Tiu loko devas esti por la alkoholulo loko, kie li povas trovi en si mem kuraĝon ekrigardi sin deflanke kaj fari konkludojn. Li bezonas ĝustan reagon, kiu donas al li eblecon kompreni, kio okazis kaj kion li evitis. Li devas kompreni la nekonformecon inter siaj vortoj, principoj kaj agoj.

PREĜO

Preĝo havas grandan forton. Ĝi efektive ŝanĝas multon. Dio povas fari multon por tiuj, por kiuj oni petas Lin. La Sinjoro pardonis kaj resanigis la paralizulon, vidante la fidon de liaj amikoj (Mk 2:5). Preĝu por la alkoholulo post ĉiu diskuto kun li. Samuel diris, ke kiu ĉesas preĝi por pekema Izrael, pekas antaŭ Dio (1 Sam 12: 23). La bezono mem estas alvoko al preĝo. Kaj tute ne necesas kriegi desur moskeaj turoj. La tragika bezono de la alkoholulo estas la alvoko al preĝo. La familianoj de la alkoholulo estos tentataj fari la preĝon ordinara, sen reala kredo. La vera preĝo estas montrita en la Sankta Skribo, kiel lukto kun si mem, kaj kun la Patro, Kiu plenumas nur tiujn petojn, kiuj estas esprimitaj en pasia kaj sincera preĝo. Kiam ni preĝas pri “Venu Via Regno”, ni petas pri la plenumo de la volo de Dio, kiu estos plenumita en niaj vivoj laŭ la volo de Dio. Ni petas, ke Li gvidu nin kaj konduku nin al la Regno, kiu certe venos. Ĉiutage ni devas strebi kunigi niajn preĝojn kun la volo de Dio.

Alkoholismon oni povas venki nur alturninte sin al la "supera potenco", kaj tio estas ankoraŭ unu kialo por turni sin al Dio kun preĝo. Vi estas en la pozicio de Jeremia, kiu vivis inter judoj-apostatoj, malbenitaj per senpluveco pro pekoj: "Ĉu inter idoloj de la nacioj ekzistas tiaj, kiuj povas doni pluvon? Ĉu la ĉielo per si mem donas pluvon? Vi estas ja la Eternulo, nia Dio, kaj ni esperas al Vi, ĉar Vi faras ĉion ĉi tion" (Jer 14:22). Kaj preĝo donas esperon. Senespereco – jen kion ofte sentas tiuj, kiuj prizorgas alkoholulojn. Se ni mem estas en sendanĝereco, se ni povas sincere ĝoji pri la konkreta Espero relate al la eterna vivo, kiu atendas nin, tiam en ni ankaŭ devas esti espero je savo de nia amiko-alkoholulo. En nia menso aperas bildo de la Patro, kiu senpacience atentis pri la malŝparema filo kaj atendas lian revenon. Li ĉiutage atendis kaj esperis (Lk 15:20). La optimismo de Dio estas mirinda inspiro por ni, se ni allasas ĝin en nian vivon. "Proksima estas la Eternulo por ĉiuj, kiuj Lin vokas, por ĉiuj, kiuj vokas Lin sincere. La deziron de Siaj respektantoj Li plenumas, kaj ilian krion Li aŭdas kaj helpas ilin" (Ps 145:18).

Vi devas scii, ke “Anonimaj Alkoholuloj” okazigas interfamiliajn renkontiĝojn. Kaj estas ankaŭ grupoj de subteno inter kristanoj, agojn de kiuj mi tre alte taksas.

PLI DETALA STUDIO

PENTO KAJ PARDONO

Mt 5:48 indikas la normon: "Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta". Se Dio ne estus tolerema al nia pekemeco, neniu estus savita. Ni ĉiuj kredas, ke Dio estas tolerema al niaj malsukcesoj atingi tiujn normojn, kiuj estas elmontritaj en Lia vorto. Kiel juĝas ni, tiel same oni juĝos nin. Ĉu ne timigas vin tio? Ni devas esti *same* atentaj montri toleremecon al tiuj, kiuj ne sukcesas atingi tiujn normojn.

Nia komuna malsukceso devas intime kunligi nin pro nia komuna sperto de la Dia pardono. Neniam oni povas repagi tion, kion ni havas de Dio. Eĉ unu peko kondukas al eterna morto; ne estas en nia forto revenigi tiun momenton, kiam okazis nia peko. Ni povas nur kredi je Dio, peti Lin forigi la rezulton de tiu peko kaj pardonu nin pro ĝi. Al ni estas dirite pardonu niajn fratojn. Pri tio diras ankaŭ Ef 4:32: "Kaj estu bonfaraj unu al alia, bonkoraj, pardonantaj unu al alia, kiel ankaŭ Dio en Kristo pardonas al ni".

SINCERA PARDONO

Kiel Dio pardonas al ni niajn pekojn, tiel ni devas pardonu niajn fratojn. Kristo sincere pardonis la ŝuldantojn en la parabolo. Kaj tiu pardono estis absoluta kaj senkondiĉa. Ps 130:2 montras la sinceran pardonon de Dio: "Se vi, ho Eternulo, kalkulus la pekojn, kiu povus stari, ho mia Sinjoro?". Dio ne rimarkas pekojn, kiam nia amo al niaj fratoj ne kalkulas iliajn antaŭajn pekojn. Se ni rifuzas interrilati kun aliaj homoj pro la *rezulto* de iliaj antaŭaj pekoj, pri kiuj ili jam pentis, ni “kalkulas” pekojn. Dio ne faras tiel rilate al ni, Li ne kalkulas niajn pekojn kaj “ne por ĉiam Li koleras” (Ps 103:7-12).

Verŝajne, vi renkontas fratojn, kiuj provas konvinki vin diferenciigi pekojn, dirante, ke pri iuj pekoj necesas penti malkaŝe, kaj pri aliaj (ekzemple, atako de kolero) oni povas penti en soleco. Sed ni devas reale konsideri, kiun pruvon pri tio donas la Biblio.

GRADOJ DE PEKO?

Petro malfacile alkiutimiĝis al la penso, ke kvanto da pekoj kaj ilia grado ne havas signifon. Sed la vortoj "Ĝis sepdekoble sep foje" montras, kiel malproksime de la vero li estis. Eĉ se la pentado de frato ŝajnas al ni nekredblaj, ni devas pardoni ilin. Rimarku, ke nur buŝa pentado necesas, kaj la Sinjoro diris, ke la pardonanto devas pardoni sen postuli iujn evidentajn pruvojn. La greka vorto por penti signifas "alie pensi poste", kaj penti - *ŝanĝi sian opinion*. Pentado estas esence ŝanĝita *mensa vidpunkto*. Pro tio estas malfacile konstati, ĉu estas ĝi en la koro de alia persono. Ĉar nia naturo mem estas pekema, ni ĉiame vivas, ĉiuminute bezonante kaj ricevante kompaton. La Novan Interligon oni ofte preparolas en la Malnova Testamento kiel "kompato" kaj/aŭ "vero". Kaj se ni estas *en* tiu interligo, ni ĉiame vivas *en* graco/kompatemeco. Kompato ne estas io, kion ni ricevas en la malmultaj momentoj, dum kiuj ni petas pri pardonado. Ĝi ĉiame descendas al ni. En ĝi ni vivas ĉiame. Se ni komprenas tion, ni devas ne opini nian pardonon de aliaj homoj kiel ion, kion ni laŭokaze "donacas". Ni devas aperiĝi nian kompatemon ĉiame, kiel tion faras Dio por ni mem.

Iuj homoj opinias, ke ni pekas nur kelkfoje, kaj tiam ni pentas, kaj ricevas kompaton. Tio malaltigas la esencon de nia interliga rilato kun Dio. Ni restas en tiu interligo, eĉ estante inter niaj pekoj, kiel estis Izrael antaŭ ol rompiĝis la interligo. Ne estas nia afero forigi iun ajn el la interligo kun Dio. Ni povas nur kunagi por aligi lin al certaj bazaj doktrinoj, kiujn enhavas la interligo. Kaj kiu ne akceptas tiujn doktrinojn, devas esti forigitaj de kunuleco, ĉar la esenco de la interligo estas tiuj doktrinoj. Sed al tiuj, kiuj estas en interrilatoj kun Dio, ni devas montri, ke la interligo estas ĉiama kompatemeco, kiun Dio elverŝas al ni.

RIGORA INSTRUISTO?

Dio ne estas rigora instruisto kun milda koro, kiu parolas: nun mi pardonas vin, sed ne faru ĝin denove! Li scias, ke ni ja denove pekos, kaj ankaŭ ni tion scias. Lia kompatemeco estas ĉiama, sed se ni volas estontece ricevi ĝin, devas esti konfeso pri peko, kaj agnosko, ke ni vivas pro Lia kompatemeco. Baptiĝinte, ni eniras en Kriston. Dio akceptas nin kiel Kriston, *kvazaŭ* ni estas tiel perfektaj, kiel Kristo. Dio kalkulas al ni Sian propran justecon, eĉ se ni ne estas perfektaj rilate al nia obeado al Liaj ordonoj. Tio estas la bazo de pravigo per fido, ne per obeado kaj forlaso de pekoj *sole*. Kiel Dio rilatas al ni, tiel ni devas rilati unu al alia. "Estu bonfaraj unu al alia, bonkoraj, pardonantaj unu al alia, kiel ankaŭ Dio en Kristo pardonis al vi" (Ef 4:32). Nian pardonon ni ricevis dum baptiĝo; la forto de peko en ni estis venkita per baptiĝo en Kriston, la morto de kiu neniigis la diablon. Certe, ni scias, ke ni estas pekemaj. Sed nia spirita esenco estas en Kristo, kaj Dio rilate al tio rigardas nin. Ni ne povas neniigi la diablon interne en ni – nur morto povas neniigi ĝin (Rom 6:23). Kiel Dio vidas en ni novan homon, tiel ankaŭ ni devas vidi novan homon en niaj fratoj.

PENTO: ĈU ĜI OKAZIS?

Se ni intencas pardoni iun, ni devas povi scii, ĉu pentis li aŭ ne. Ni devas atente esplori la demandon: "Ĉu povas ni scii, ĉu iu pentis aŭ ne?". Se la respondo estos "jes", ni bazas sin sur la eksteraj signoj. Ni supozas, ke ni havas kriteriojn por decidi, ĉu pentis iu aŭ ne. Sed ĉu la Biblio donas al ni tiajn klarajn kriteriojn? Estas malfacile eviti la konkludon: "*Ne, ni ne povas scii, ĉu pentis iu aŭ ne*". Pentado devas antaŭi al baptiĝo. Sen pentado baptiĝo ne validas. Sed kiel ni povas scii, kiam la kandidato pentis kaj ĉu pentis li? La Sinjoro diris al ni, ke ni devas pardoni "ĝis sepdekoble sep fojoj" (Mt 18:22). Kaj tio instruas nin, ke ni ne havas eblecon juĝi pri la sincereco de pentado; ni povas nur pardoni.

ANTAŬ DIO KAJ HOMOJ

Estas diferenco inter pekanto antaŭ eklezio kaj pekanto antaŭ Dio. Lk 15:18,21 montras, ke diferenco estas. Ni devas pardoni ĉiun, kiel Dio pardonas nin, sed tio ne signifas, ke kiam ni pardonas iun, ni tion faras por Dio. Ni ne rajtas agi por Dio mem. Anstataŭe, la respondo de Dio al ni devas indiki nian respondon al nia eraranta frato. Dio pardonas nin, se ni mem pentas kaj ĉesas peki La Biblio montras, ke nia pardono al aliaj fratoj devas ne esti bazita same sur tio. Ni pardonas aliaj homojn, ĉar Li pardonis nin. Sed la esenco de la Dia pardono estas alia, ĝi baziĝas sur persona kredo de homo je la sango de Kristo. Ni ne demandas niajn gefratojn, ĉu kredas ili je la venko sur la kruco de Golgota aŭ ne, antaŭ ol pardoni ilin.

PARDONO SEN PENTO?

La sentemaj fratoj aŭ fratinoj agnoskas, ke ofte ni estas pardonitaj sed daŭrigas peki, kaj tio devas havi respogulon en niaj reagoj je pekoj de aliaj homoj. La subaj linioj konfirmas tion:

- David preĝis: "Kiu scias siajn erarojn? Purigu min de eraroj kaŝitaj" (Ps 19:12). Ĉiu peko estas peko, sendepende, ĉu konfesas ni ĝin aŭ ne (kiel pri tio atestas la oferdonoj de Moseo). Neniu el ni scias, kiel Dio pritaksas niajn agojn, neniu el ni scias ĉiun el niaj pekoj. Nur sintrotakso devigas nin opinii, ke ni scias ĉiun nian pekon. Ni devas konfidi nin al favoro de Dio, kredante, ke al ni estos pardonitaj ankaŭ tiuj niaj pekoj, kiujn ni ne konfesis. Kaj se ni esperas ricevi pardonon pri niaj eĉ "kaŝitaj" pekoj, ni ne devas havi la principon – neniam pardoni niajn gefratojn.

- La Patro pardonis sian malŝparegantan filon, kvankam li ne vidis signojn de pentado ĉe li. La fakto mem, ke la filo *ekvolis* reveni en la Patran domon, estis sufiĉa motivo por ke la Patro akceptu lin.

- Ni devas beni/pardoni tiujn, kiuj persekutas nin (Rom 12:14); beno kaj pardono estas kunligitaj en la Skriboj). Kaj tio devas esti farita sen atendo, ke la persekutanto ĉesas peki aŭ pentos.

La Sinjoro vidis kunligon inter tio, ke la peka virino kisis lin kaj tio, ke ŝi "multe amas". (Lk 7:45,47). Poste li rakontis la parabolon pri ŝi kaj Simon la Fariseo. Ambaŭ estis pardonitaj de li, sed forestas iu ajn atesto, ke Simon pentis antaŭ la pardono.

- Ni devas pardoni tiun, kiu "pentas" 490 fojojn pro la sama peko, komprenante, ke lia pentado ne estis sincera. Tamen ni devas lin pardoni.

La Sinjoro preĝis, ke la soldatoj estu pardonitaj, ĉar ili ne sciis, kion ili faris. La fakto ke Jesuo petis por ilia pardono, montras, ke ili estis kulpaj pri peko, kvankam ili ne sciis pri ĝi kaj, sekve, ne pentis pri ĝi. Sed Jesuo sciis, ke pardono eblas ankaŭ sen pentado. Tio rifutas la hipotezon, ke pardono povas esti donita, *nur* se peko estas ĉesita.

- Dio pardonas homojn pro ilia kredo je la sango de Kristo kaj pro ilia baptiĝo; ne pro "laboroj faritaj en justeco" (Tito 3:4-8). Ni devas esti atentaj kaj ne insisti, ke iu nepre ĉesu pekon en fizika senco. Ĉiu peko - ajna peko - meritas morton. Kvanto da pekoj ne ŝanĝos tiun verdikton. Nur unu vojo estas por eviti ĝin - esti en Kristo, por ke Dio rigardu nin kiel Kriston. Se forestas la kredo je Kristo, ĉeso de peko ne alportos al ni savon.

- Al la homo el Mt 18:26 estis pardonita lia ŝuldo nur pro lia *deziro* repagi ĝin. Kaj de li oni atendis, ke li same faros rilate al siaj ŝuldantoj.

DU NORMOJ?

- Dio montras al ni altan normon, sed estas preta akcepti nian atingon de pli malalta normo. Ni ĉiuj iam deiras de la ordonoj de Kristo. Tamen ni havas fortan esperon je savo. Sekve, obei al ordonoj ne estas la sola neceso por ricevi savon. La ordono "Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta" (Mt 5:48) estas neplenumita de ĉiu el ni. Eblas malobei al la ordonoj de Kristo ĉiun tagon, kaj tamen esti savita. Se tio estas malvera, savo eblas sole se ni atingas al la perfekteco de Kristo, kio estas neebla.

La Skriboj donas al ni la idealan normon por geedzeco, sed ni akceptas tiun, kiu estas pli malalta. Tio estas evidentigita per la kelkfoje uzata en la teksto vorto "sed":

- Estas bone ne edziĝi, "sed se vi edziĝas, vi ne pekas" (1 Kor 7:28).
- "Sed" (tamen) ankaŭ oni povas renkonti en versoj 10 kaj 11: "Edzino ne foriĝu de sia edzo, tamen, se foriĝas...". Sekve, foriĝon de edz(in)o Dio permesas kiel cedon al homa malforteco.
- Edzino estas ligita tiel longe, kiel vivas ŝia edzo, sed se la edzo mortis..." (1 Kor 7:39,40; 1 Tim 5:11)
- La saman principon de "du normoj" ni vidas aliloke en 1 Kor 8. Viando oferita al idoloj estis nur viando, sed Paŭlo faras cedon por tiuj, kiuj dume havas ne klaran komprenon rilate al tio.
- Same en 1 Kor Paŭlo diris, ke li povus peti la korintanojn pri financa subteno, sed li elektis alian. Tiele li elektis la plej superan el du elektoj.
- Tiuj kiuj havis la donacon de lingvoj devus uzi ĝin sole por instrui aliajn, prononcante kompreneblajn vortojn publike; sed Paŭlo estis preta permesi al la korintanoj paroli en lingvoj, kvankam tio, ŝajne, kontraŭas al lia antaŭa klarigo pri la ideala uzo de tiu ĉi donaco.
- 1 Kor 12:31-13:12 montras, ke Paŭlo staris antaŭ la pli alta elekto de la servado al amo kaj la skribita vorto, komparata kun la pli malalta elekto de uzado de la Spiritaj donacoj. Ĉiuokaze, komparu tion kun tiu elekto, priskribita en Fil 1:21-26; lasi tiun ĉi vivon estis eble por li, sed li faris la superan, pli malfacilan, spirite pli danĝeran elekton – vivi ankoraŭ kelkajn jarojn por fortikigi siajn fratojn.

Tiun cedadon al malforteco ni devas respeguli en niaj interrilatoj kun aliaj homoj. Tamen tio certe ne signifas, ke ni neniam "tiros linion" rilate al frateco en decidoj de nia eklezio.

SPIRITA AMBICIO

La fakto, ke Dio toleras pli malaltan normon, devas instigi nin ne ĉiame dependi de ĝi; ni devas esti ambiciaj atingi tiun pli altan normon, kiu estas pli agrabla por Li. 1 Kor 7 montras, ke Dio toleras pli malaltan normon en geedzeco, kiu estas la parto de eklezia vivo. En la Malnova Testamento estas ekzemplo de tio. Abraham vivis laŭ la normoj de Edeno, ne laŭ la leĝo de Moseo. La Edena normo rilate al geedzeco konformas al tiu de Kristo. Tamen Abraham krom Sara havis Hagaron; Jakobo ankaŭ havis du edzinojn, kaj Dio toleris tiun deflankiĝon de unu viro - unu virino idealo.

La principoj de Dio ne ŝanĝiĝis je la momento de la morto de Jesuo sur la kruco, post kiu iĝis valida la nova interligo. Ambaŭ tiuj interligoj montras la samajn principojn, sed diversamaniere. Senŝanĝa restas ankaŭ la principo de Dio pri cedo al homaj malfortecoj, kaj tio konfirmas Lian kompaton al ni.

SERĈANTE DION

La profetaĵoj ofte rememorigas al ni, ke spirita vivmaniero estas tiu, kiu serĉas Dion. Ni devas serĉi Lin (Ps 24:6; 27:8), sed vidi Lin ni ne povas (El 33:20). Fakte, trovi Dion en tiu ĉi vivo, en la fina senco, estas neatingebla, sed ni devas vivi serĉante plenan spiritan perfektecon. Serĉado de Dio, laŭ la profetoj, estas deziro iĝi justa kaj ĉesi peki (Am 5:5,8,14,15). Neniu el ni povas atingi plenan sukceson en nia serĉado de Dio, kaj sekve, neniu el ni *tute* ĉesis peki.

En kunuleco nin kunigas tio, ke ni serĉas la saman Dion kaj efektivigon de la sama justeco (Cef 2:3). Kaj tio firme kunigas nin, ne tio, ke ni ĉiuj estas justaj. Kun tiuj, kiuj inklina al malbono, kiuj ne komprenas la justecon de Dio, ni ne havas kunulecon. Sed ni devas ne opinii, ke nepre necesas rompi rilatojn kun tiuj, kiuj ne sufiĉe diligente serĉas Dion, se estas agnoskita, ke ili ne serĉas malbonon. Pento kaj serĉado de Dio estas kunligitaj: la restariĝo de Izrael komenciĝis post kiam ili pentis kaj komencis serĉi Dion (Jer

29:12-14). Kvankam Izrael en tiu tempo estis ankoraŭ spirite malforta, sed kelkaj el ili havis deziron serĉi justecon, kaj Dio akceptis tion.

3. LA BIBLIA RESPONDO

3.1 ENKONDUKO

Vivo kun alkoholismo naskas spiriton de senespereco. Tio estas siaspeca konvinko, ke Dio ne povas helpi. Tamen fido je Dio estas provata. Ni povas havi realan esperon je la pli bona. Preĝo povas ŝanĝi multon. Alkoholismo ne estas neelkuracebla malsano. La ekzemplo kaj inspiro de la persono de Jesuo ŝanĝas nian vivon. Kaj Dio influas nian vivon miraklamaniere. Iufoje tiu mirakla influo radikale ŝanĝas homan vivon (9). Ni kredas, ke mirakloj okazadis en la pasinteco, ĉar ni kredas, ke la Biblio estas la vorto de Dio. Ni devas konscii la kunligon inter tio, kion Li faris en la pasintaj tempoj kaj tio, kion Li povas fari hodiaŭ. Jen kial la Psalmoj ofte rakontas pri tio, kion Dio jam faris, ekzemple, ĉe la Ruĝa maro, kaj samtempe insiste petas Dion eniri *senprokraste nun* en la vivo de la Psalmisto. Biblia historio ne estas finita. Ĝi ne estas morta historio ekstere de niaj interesoj. Tiuj eventoj vivas kaj rilatas al ni, ĉar tiu Dio estas nia Dio. "Tiam la Eternulo diris al Moseo: Ĉu la brako de la Eternulo estas tro mallonga? Nun vi vidos, ĉu plenumiĝos al vi Mia vorto, aŭ ne" (Nom 11:23).

La metodo "Dek du paŝoj" de la societo "Anonimaj Alkoholuloj" (vidu Aldonon 1) ricevis tutmondan agnoskon, kiel la plej efektiva metodo de kuracado de alkoholismo. Ni devas honti, sed tio estas fakto. Tiu ĉi organizo eĉ ne estas kristana. La vera kristanismo devas esti pli forta, ol "Dek du paŝoj" de "Anonimaj Alkoholuloj". Sed ni devas apogi nin al tiu ĉi fakto kaj kun helpo de ĝi aliĝi al venko de la problemo. Tamen ni apenaŭ komencis agnoski tiun problemon, kaj dume nenion faris por decidi ĝin. Ni estas benitaj de la vero, kaj pro tio ni devas esti antaŭe, esti ekzemplo por nia generacio; paroli al homoj pri tio, kion la Biblio diras pri alkoholismo, estas nur unu el multaj flankoj de nia agado, en kiu ni povas uzi niajn sciojn, ricevitaĵojn el la Biblio. La reala ebleco superi alkoholismon estas kunligita kun kompreno de la vera naturo de peko, tento, la Biblio "diablo", Dio Mem kaj Lia potenco de savo. Ĝuste pri tiuj temoj la kristana komunumo estas benita per profundaj scioj. La vero, donita al ni devas ne resti nur teoria, logika, teologia vero. Ni devas montri tiujn sciojn praktike, ne nur por ŝanĝi vivojn, sed ankaŭ kiel kuracilon, kiu forestas en ajna sistemo de kuracado de alkoholismo. La veraj doktrinoj nepre alkondukos al la vera vivmaniero. Vivo en la vero, kun Dio, kuracos alkoholismon. Nia komunumo praktike uzas siajn sciojn en la batalo kontraŭ alkoholismo.

3.2 EVIDENTECO KAJ KONVINKO

La alkoholulo devas kompreni, ke li vivas kaj agas erare, kaj ne nur malutile por si persone, sed ankaŭ erare antaŭ Dio. Alkoholuloj havas malaltan sintakson; se vi dum diskuto diros, ke ili "malutilas al si mem", tio ne havos efekton. Necesas konvinki ilin, ke ili, estante en stato de ebriiĝo, per tio ofendas Dion, sian kreinton. Ne sufiĉas nur diri, ke la Biblio malaprobas ebriecon. Jes, la Biblio malaprobas ebriecon. Sed ĉiu deklaro de Dio havas siajn argumentojn. Necesas uzi ilin. Ne sufiĉas nur diri, ke tio estas malpermesita.

- Alkoholismo baziĝas sur ĉiama trompo. Alkoholuloj trompas sin mem kaj tiujn, kiuj ilin ĉirkaŭas. Tio ne estas hazarda mensogo. Tio estas situacio, kie malvero forbruligas la vivon de homo. Dio postulas, ke ni parolu veron kaj vivu en la Vero, se ni efektive volas esti Liaj infanoj.

- Ni devas aspiri por vivi en la spirito, peni ne subiĝi al intencoj de la karno. En la karno ni ne povas komplezi al Dio. "Sed surmetu la Sinjoron Jesuon Kristo, kaj ne sekvu la intencojn de la karno al voluptoj" (Rom 13:14). Ekzemple, alkoholo libere havebla en la domo estas ĝuste tio, kion Dio ne aprobus por alkoholuloj. Alkoholuloj lerte uzas ĉiun situacion por ricevi eblecon akiri alkoholaĵon kaj daŭrigi trouzi ĝin.

- Kvankam en iu senco "ĉio estas por mi permesata" (1 Kor 6:12; 10:23), ne ĉio estas permesita de Dio, se ni fariĝas submetitaj sub ĝia povo. Alkoholismo sklavigas homon. Dio volas, ke ni estu liberaj kaj laŭ propra volo ni servu al Li. "Por libereco Kristo nin liberigis, tial staru fortike, kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco" (Gal 5:1). Ne neu tion, kio okazis sur la kruco nur por reveni al peko.

- Alkoholismo baziĝas sur ĉiama rifuzo ami. Tio, ke alkoholuloj ne zorgas pri si mem kaj pri aliaj homoj, estas nekunigebla kun la ekzemplo de Jesuo. Se ni ne havas Lian spiriton, ni ne estas Liaj. Ni ne povas deklari, ke ĉiuj alkoholuloj estas "ne Liaj", ne apartenas al Dio. Tamen alkoholo detruas familiojn; se homo ne zorgas pri sia familio, li estas "pli malbona ol nekredanto" (1 Tim 5:8).

- Ni devas malkaŝi nin antaŭ Dio. Alkoholismo delogas nin de memkonscio, de kompreno pri niaj agoj, pri nia doloro kaj niaj interrilatoj... kiam laŭ la vorto de Dio, ni devas alfronti ilin, helpe de Lia graco.

RESPONDECO

La Biblio instruas nin, kaj inter ni tio estas unua principo, ke scio estas kunligita kun respondeco. El tio necesas konkludi, ke se ni scias, ni respondecas agi konforme al tiu scio. Alkoholuloj bezonas helpon, sed ili volas, ke iu alia estu respondeca pro ilia konduto, ĉar ilia senco de respondeco estas ŝanĝita je pereiga sento de kompatato al si mem. Estas unu strategio por la kristanaj alkoholuloj, aŭ eĉ por la nekredantaj homoj, kiuj havas iom da scio pri la Evangelio – rememorigi kaj instrui al ili bazajn sciojn pri Dio. Komprenigi al ili, ke ili estas Liaj infanoj, kreitaj laŭ Lia bildo, ke ili respegulas Lian gloron; ke Lia filo havis la saman homan naturon, kiun ili havas, sed li neniam pekis, kaj tio devigas nin esti respondecaj antaŭ Li. Mi kredas, ke predikado de la Evangelio povas iri flank' ĉe flanko kun kuracado kaj zorgo pri alkoholuloj. Ju pli ili scios pri la "supera potenco", des pli respondecaj ili estos antaŭ Li, des malpli ili volos peki.

KOMPRENO DE NIAJ MALFORTAĴOJ

Agnoski homajn malfortaĵojn estas la ŝlosilo al la programo "Dek du paŝoj" de la societo "Anonimaj Alkoholuloj". Tiuj, kiuj zorgas pri alkoholuloj devas kompreni, ke li aŭ ŝi ne povas esti la Savanto de la alkoholulo. Perforte ĉi tie oni povas ŝanĝi nenion. Kaj tio revenigas nin reen al baza demando: Ĉu kredas ni, ke Jesuo signifas "Savanton"? Ĉu ni kredas je li? Nur la Patro kaj Filo povas ŝanĝi homan vivon. Ni povas turni nin al ili kun preĝo, kaj tio estos la sola ĝusta solvo de la alkohola problemo. Homoj mem estas senpovaj. La alkoholulo mem devas rekoni tion. Necesas kelkfoje legi al ili Rom 7:15:25, kiu respegulas la internan batalon en la animo de ĉiu alkoholulo:

"Ĉar mi ne havas certecon pri tio, kion mi faradas; ĉar mi ne agas laŭ tio, kion mi volas; sed kion mi malamas, tion mi faras. Sed se mi faras tion, kion mi ne volas fari, mi konsentas al la leĝo, ke ĝi estas bona. La faranto do estas jam ne mi, sed la peko, loĝanta en mi. Ĉar mi scias, ke en mi (tio estas, en mia karno) bono ne loĝas; ĉar ĉe mi estas la volo, sed ne la elfaro de la bono. Ĉar la bonon, kiun mi volas fari, mi ne faras; sed la malbonon, kiun mi ne volas fari, mi faradas. Sed se mi faras tion, kion mi ne volas fari, faras ĝin jam ne mi, sed la peko, loĝanta en mi. Mi do trovas leĝon, ke kiam mi volas fari bonon, la malbono estas ĉe mi. Ĉar mi ĝojas en la leĝo de Dio laŭ la interna homo; sed mi vidas alian leĝon en miaj membroj, militantan kontraŭ la leĝo de mia menso, kaj forkaptantan min sub la leĝon de la peko, kiu estas en miaj membroj. Ho ve, mi malfeliĉulo! Kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu morto? Danko estu al Dio, per Jesuo Kristo, nia Sinjoro" (Rom 7:15-25).

Kiam ni penas fari bonon, en ni ĉeestas malbono. Malfeliĉaj homoj ni estas. Sed tiuj vortoj estas ditaj ne speciale pri alkoholo, ili taŭgas por ĉiu okazo. Ili koncernas pekon ĝenerale. Ni ĉiuj estas difektitaj de la psikologio de la alkoholulo. Kaj ankoraŭ Paŭlo diris en Rom 8, ke dank' al Dio, ni per Jesuo Kristo havas la vojon al savo. La nedifinita "alta potenco" de la societo "Anonimaj Alkoholuloj" ĉi tie estas difinita. Nia homa fiereco ne permesas al ni akcepti la majestecon de la Eternulo kaj Lia filo. Al ni ŝajnas, ke ni mem kapablas superi tiun ĉi problemon.

Humileco kaj amo al homoj estas tiel vivnecesaj. La plej tragika estas tio, ke alkoholuloj, kiuj jam dum kelkaj jaroj ne trinkis alkoholaĵojn, denove komencis drinkadi. Praktike en ĉiuj tiaj okazoj la kialo estas en tio, ke ili ne agnoskis siajn malfortaĵojn. "Antaŭ la pereco iras fiereco; kaj antaŭ la falo iras malhumileco" (Sent 16:18). Ofte mi vidis fierecon en homoj, kiuj restis sobraj dum monato. Ili fieris pri tiu fakto. Ilia fiereco kondukas al tio, ke ili forgesas pri siaj malfortaĵoj, pri sia bezono de Dio, kaj denove falas en pekon.

Homo estis kreita de Dio el polvo de la tero. Li devas ne fieri kaj ne humiligi aliajn. En nia egoisma naturo mankas respekto al aliaj homoj. Ju pli ni konscios, ke ni estas kreitaj el polvo, konscios nian sensignifecon, des malpli ni faros erarojn. Ni ne bezonas atendi ĝis juĝa tago por kompreni tion. Pri la naturo de homo kaj lia morteco ni scias el la ĉefaj doktrinoj de la Biblio. La kunligo inter humileco kaj nia morteco estas priskribita de Paŭlo: "Kiu (Jesuo) denove elformos la korpon de nia humiliĝo, por ke ĝi konformiĝu al la korpo de lia gloro, laŭ la energio, per kiu li eĉ povas ĉion al si submeti" (Fil 3:21).

Kompreno de tio, ke ni estas mortemuloj, helpas al ni esti humilaj. Nia kredo je Dio montras al ni la malfortecon de homaj eblecoj. Ni preferas konfidi niajn problemojn al kuracisto aŭ al bona najbaro antaŭ ol konfidi ilin al Dio, kiel al la lasta instanco. "Ĉesu zorgi pri homo, kies animo estas en liaj nazotruoj; ĉar kion li valoras?" (Jes 2:22). Ĉu oni povas kompari homon kun Dio de Izrael? En la libro de Ijob 27:9,10 estas skribite, ke ĉiu homo, mortante, turnas sin al Dio kun vortoj similaj al preĝo. Sed kredo je Dio helpas al homoj ĉiame turni sin al Dio kun preĝoj. Kompreno de tio, ke ni estas mortemuloj, donas al ni saĝecon: "Kaŝita ĝi estas antaŭ la okuloj de ĉiu vivanta, nevidebla por la birdoj de la ĉielo. La abismo kaj la morto diras: Per niaj oreloj ni aŭdis nur famon pri ĝi" (Ijob 28:21,22). Alkoholuloj kaj iliaj familianoj kunpuŝiĝas kun similaj problemoj. La sola vojo por ili – agnoski nian homan malfortecon kaj la grandecon kaj potencon de la Patro kaj Filo, la amo de Kiuj superas nian komprenon.

PLI DETALA STUDO

VERO: BIBLIA ANALIZO

Ĉiuj ni serĉas iun, kun kiu ni povas esti tute sinceraj, kiu gardas niajn sekretojn, kiu kompatas kaj komprenas nin. Ĉiafoje, kiam ni opinias, ke ni trovis tian homon, kaj li trompis niajn esperojn, ni seniluziiĝas pri li kaj kaŝiĝas en ni mem. Malplenumi promesojn, perfido, klaĉoj – ĉio tio estas peko; kaj kiel komunumo ni devas urĝe ekrigardi nin deflanke, por kompreni, ĉu aligas nin nia konduto al la Patro kaj al aliaj gefratoj, aŭ ni kaŝiĝas de ĉiuj en si mem. Timante fari erarojn, ni penas, ke niaj rilatoj kun aliaj homoj ne estu intimaj. Dum interparoloj kun ili ni intence penas ne malkaŝi tion, kio estas en la profundo de nia animo. Ni ne konfidas al ili niajn malsukcesojn, seniluziiĝojn, ni ofertas veron por subteni dubindajn bonajn interrilatojn. Kaj tio kondukas nin al malespero, al "soleco en la homamaso", kiu estas tiel disvastigita nun. Nur en Kristo ni aliĝas al "la vero". Ĝuste tion ni serĉas en la vivo. Kion do ĝi signifas?

En la Sankta Skribo la vorto "la vero" estas simbolo de la pia vivo; honesteco rilate al ni mem kaj al Dio estas efektiviĝo de la vivo, kiun Dio promesis al ni. Mi volas substreki ĉi tie, ke ofte homoj opinias, ke se ili scias la Evangelion kaj kredas je ĝi, ili aŭtomate iĝas "en la vero". La subaj konkludoj sufiĉe klare montras, ke "la vero" rilatas ne nur al intelekta kompreno de la vera vojo de vivo. Se iu komprenas la Bibliajn profetaĵojn alie ol ni, tio ne signifas, ke li aŭ ŝi deiris de "la vero". Sed se ni (ekzemple) mensogas, tio signifas, ke ni deiris de "la vero", malgraŭ nia vera kompreno de la Bibliaj doktrinoj:

- Pekuloj deturnas sin de la vero (2 Tim 4:4; Tito 1:14). Ili estas senigitaj je la vero (1 Tim 6:5). Dio malkovris la veron, sendinte Sian filon proklami ĝin, sed pekemaj homoj rifuzis aŭskulti.

- Paŭlo, en sia epistolo al Efesanoj skribas: "Sed parolante la veron en amo, ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo" (Ef 4:15). Ni povas kompreni tion, kiel "proklami kun amo la veron". Paŭlo diras, ke reala spirita kresko estas atingebla nur per vivo en la vero.

Paŭlo alvokas la Korintanojn: "Tial ni festu, ne per malnova fermentaĵo, nek per fermentaĵo de malico kaj malboneco, sed per la senfermenta pano de sincereco kaj vereco" (1 Kor 5:8). La vero estas direktita kontraŭ malbono, ne kontraŭ erara interpreto de la Bibliaj citaĵoj.

- "Tiu, kiu vivas honeste, agas juste, kaj parolas veron el sia koro" (Ps 15:2). La vero devas vivi en nia koro.

- "Izrael diru, ke eterna estas Lia boneco" (Ps 118:2 kaj ankaŭ Ps 69:13). "Boneco" ĉi tie reprezentas savon kaj kompaton. Kompato kaj savo rilate al aliaj homoj devas esti "veraj" en la Biblia senco.

- Jer 5:1 diras, ke ĉiu, "kiu agas juste kaj serĉas la veron", estos pardonita. Tio signifas - penti kaj serĉi pardonon. Sed ne ĉiuj tiuj, kiuj serĉas veran komprenon de la Bibliaj versoj estos pardonitaj.

- En Jer 9:3 ni legas: "Per siaj langoj ili pafas mensogon kiel per pafarko, ne por vero ili fortiĝas sur la tero". Esti forta por vero ne signifas akre disputi kun aliaj pri la interpreto de Skribo. Tragike estas, ke tiajn homojn kelke da homoj rigardas kiel "forta por vero". Tio ne estas la senco de tiuj vortoj de Jeremia.

LA VERA VIVO

"La vero", sendube, rilatas al la Evangelio. Ni kredas je tio. Paŭlo diras pri tio: "Pro la espero konservita por vi en la ĉielo, pri kiu vi jam antaŭe aŭdis en la vorto de la vero de la evangelio" (Kol 1:5) kaj "ni ne submetiĝis cedeme, eĉ por unu horo; por ke la vero de la evangelio restadu kun vi" (Gal 2:5). Li turnas sin al "la vorto de la vero - la evangelio de nia savo" (Ef 1:13). Laŭ la Biblio nia kredo estas "la vero". La vero estas resumigo de tiu vivmaniero, kiu baziĝas sur vera instruo. Tiele, ni devas "surmeti la novan homon, kreitan laŭ Dio en justeco kaj vera sankteco" (Ef 4:24).

Ni obeas al la vero en sincera amo al nia frataro (1 Pet 1:22) ne nur antaŭ baptiĝo, kiam ni respondas al demandoj; ni estas en la vero, se ni kun amo rilatas al niaj gefratoj, kiam ni iradas en la vero (3 Joh 3). Ni devas sekvi la Evangelion (Gal 2:14). La vereco de la doktrinoj, je kiuj ni kredas, igas nin vivi en la vero. "La jenon do mi diras, kaj protestas en la Sinjoro, ke vi ne plu iru tiel, kiel iras ankaŭ la nacioj en la vanteco de siaj mensoj, mallumigitaj en intelekto, fremdigitaj for de la vivo de Dio, pro la nescio, kiu estas en ili, pro la malmoleco de ilia koro... Sed vi ne tiel lernis Kriston; se almenaŭ vi lin aŭdis, kaj en li estis instruitaj, kiel en Jesuo estas vero" (Ef 4:17-21). En 2 Tes 2:12 ni legas: "Vi iradu inde je Dio, kiu vin vokas en Sian regnon kaj gloron". Estas morala kunligo inter ĉiu mensogo kaj senspiriteco. Ni devas "en humileco instruante tiujn, kiuj kontraŭstaras; eble Dio donos al ili penton, por ke ili venu al scio de la vero" (2 Tim 2:25). Homo povas ellerni teorie la veron de Dio (2 Tim 3:7), neniam atinginte ĝin, tio estas, penti kaj vivi en la vero, nenion kaŝante de Dio, estante honesta kun si mem.

LA VERO DE KRISTO

En Joh 18:37 Jesuo antaŭ sia morto diris al Pilato pri si mem, ke li naskiĝis kaj venis en la mondon por atesti pri la vero. Kaj la kruco estis la plej supera atesto kaj montrado de la vero. Tio ne estas proklamo de doktrinoj, sed pli ĝuste, la vojo de vivo, al kiu tiuj doktrinoj kondukas. En Gal 3:1 Paŭlo kulpigas la galatojn, ke ili ne obeis al la vero, kiun tiel klare montris al ili krucimite Kristo; Paŭlo klare vidis obeon al la vero en obeo al la ofero de Kristo. En Gal 4:16: li elkrias: "Ĉu mi do per verdiro fariĝis al vi malamiko?". Tiele, estas la paralelo inter la vero kaj la ofero de Kristo. Ni estas sanktigitaj en la vero (Joh 17:19), sed nia sanktigateco devenas de la sango de Kristo (Heb 9:13; 10:29; 13:12). Povas esti, en tio estas kialo, ke en Dan 8:11,12 "la sankta loĝejo" signifas "la vero". La ofero de Kristo estas la vero. En tio ni

vidas la homaron kiel ni fakte estas, en tio ni vidas la realan efekton de peko. Antaŭ ĉio, la realeco estas en tio, ke Homo kun nia naturo superis pekon, kaj pro lia memofero niaj pekaj povos esti pardonitaj; kaj ni havas realan, konkretan, definitivan esperon ricevi eternan vivon.

Jesuo diris al homoj, ke li estas senpeka: "Kiu el vi pruvas kontraŭ mi pekon? (Joh 8:46). Kaj en Joh 17:19 li diris: "Kaj por ili mi konsekras min, por ke ili mem ankaŭ estu konsekritaj en la vero". Lia perfekta vivo kaj morto povas konsekri nin. Restante en la vorto de Jesuo, ni scios la veron (Joh 8:31,32) - ne nur pli altan komprenon de la doktrinoj, sed nia vivo mem respegulos nian scion pri Jesuo, kiu estas "la vero". La vero liberigas nin; la Filo faras nin liberaj (Joh 8:32,36). "La vero" estas do titolo de Jesuo. Nura akademia scio ne povas liberigi homon de peko, sed la ekzemplo de la spirita vivo de la Filo de homo povas, kaj liberigas. Jesuo diris: "Mi estas la vojo kaj la vero kaj vivo" (Joh 14:6); "En Jesuo estas vero" (Ef 4:21). La spirita vivo en Kristo liberigas nin de peko (Rom 8:2); sed en Gal 5:1 estas dirite simple, ke *Kristo* liberigis nin de peko. La homo Kristo Jesuo estas "spirito de vivo"; la Homo kaj lia vojo de vivo estis en perfecta konformeco. En li la vorto fariĝis karno. "Vero" estis en Li; perfekte kaj plenkomplete en li estadis la principo de la vero de Dio.

INTERPAROLO KUN SI MEM

Kion tio povas signifi praktike? Ni ĉiuj interparolas kun ni mem. Ene en ni ĉiame okazas interna parolo. Iuj homoj daŭrigas kun si mem interparolon, en kiu estas memsubtaksigo, tagon post tago, monaton post monato, jaron post jaro. Aliaj pensas pri imagata malbono farata de aliaj. La pensoj de iuj homoj estas plenigitaj de vanteco, sintrotakso, volupteco, diversaj fantazioj... kaj finrezulte ĉio tio influas al iliaj vortoj kaj agoj. Tion, kio okazas en nia koro ni esprimas per vortoj. "Pli ol ĉion gardatan, gardu vian koron; ĉar el ĝi eliras la vivo" (Sent 4:23). Jen tial ni devas gardi la veron *en niaj koroj*. Nia interna interparolo povas esti imagita frukto de nia fantazio, nia imago. Penu, ke ĉiuj niaj interparoloj estu veraj, eĉ se temas ne pri spiritaj aferoj. Estus ideale, se nia interna interparolo estus pri Jesuo, pri la Patro, kaj Lia Regno. Sed malbone estas, se ni ene en ni rezonas pri tio, kio en la Biblio nomiĝas la diablo – en tio estas la fonto de malveraj supozoj kaj malbonaj agoj. La diablo laŭ la Biblio estas "la patro de mensogo" (8:44). Kaj maljusteco komenciĝas en nia propra interno. Mi povas eĉ supozigi, ke la Diablo estas nia propra interna voĉo. Jen ĝi similas al muĝanta leono, jen - al ruza serpento. Kaj ĝi estas interne en ĉiu el ni. Vivgravas regi nian internan voĉon. La Biblio gvidas nin en nia kompreno de tiu ĉi vero; manko de vero estas fonto de malbono kaj peko. Kutime, peko estas ne sekvo de koscia ribelo, sed rezulto de komplika procezo de mempravigo. Jen kial vero estas la esenco de la spirita vivo. Neante malverecon ni neas pekecon. Ni ĉiuj havas tiun ĉi problemon. Jen kial la aserto de Jesuo, ke li estas "la vero", signifas, ke li estis tentata, sed estis senpeka. Nur pro tio estas Jesuo la vojo al eterna vivo.

3.3 PENTO

Ankaŭ en tio la kredanto havas avantaĝon super la nekredanto. Georg Best en sia membiografio "La Bono. La Malbono kaj La Ĉampano" kronologie priskribas sian batalon kun alkoholo, substrekante, ke malgraŭ riĉeco kaj fameco, aŭ, povas esti, pro ili, li ne havis realan motivon por ĉesi drinki. Multaj alkoholuloj ne povas ĉesi drinki nur pro foresto de motivoj. Oftaj malagrablaj rememoroj pri ilia lasta ebriiĝo povas esti motivo, sed nur por kelktempa periodo. Por ni la motivo ne estas nur egoisma deziro por pli agrabla familia aŭ ekonomia vivo, sed ni havas ankaŭ devon antaŭ Dio. Ni konscias, ke alkoholismo estas peko kontraŭ la volo de Dio. Ni povas nomi alkoholismon malsano, aldoni medicinajn kaj fiziologiajn terminojn, kompreni tion kiel siaspecan vivovojon, sed ĝi tutegale restas peko. Ni amas Dion; Li amas nin, amas kaj amis pli forte, ol ni povos percepti. Tial ni celas vivi tiel, kiel antaŭdifinis al ni Dio, ni serĉas vojon por vivi la Regnovivon jam nun. Ni sincere volas esti similaj al tiu, kiu amis nin ĝis la fino, kiu oferdonis sian vivon pro ni, lia popolo. Por la kredanta alkoholulo tio devas iĝi kialo por deiro de alkoholo. Ni volas esti similaj al Li, vivi tiel, kiel Li vivis kaj vivas nun.

Drinkuloj ne heredos la Regnon; pri tio diras 1 Kor 6:10 kaj Gal 5:21. Ĉu signifas tio, ke alkoholuloj, kiuj ne povas ĉesi drinki, ne estos en la Regno? Ĉe kiu kondiĉo do ili heredos la Regnon? Nur ĉe kondiĉo de

sincera pento. Ili devas havi en si mem fortan volon returni sin de la pereiga pasio. Estas facile fingromontri al alkoholuloj. Ilia peko klare videblas kaj estas malaprobata. Sed ĉiuj ni estas pekemaj. Ni pekas, pentas kaj denove pekas. Ni senesperigas. Ni malamas pekon ni alkroĉiĝas al la vortoj de Paŭlo en Rom 7:15:25 kaj trovas sinpravigon en tio, ke peko estas en nia interna esenco. Sed en Rom 8 ni legas, ke la spirito de nova vivo en Jesuo liberigas nin de la ŝajne neevitebla leĝo de peko, kiu estas en ni. Ĉe denovaj malsukcesoj ni miras, ni malamas pekon kaj sentas pasian deziron superi ĝin. Ni kun ĝojo atendas la savon de la Regno. Kaj iom post iom ni sukcesas ŝanĝiĝi. Tio estas la minimumo, kiun Dio atendas de ĉiu frato kaj fratino, kiuj estas alkoholuloj kaj ankaŭ de tiuj, kiuj loĝas kun ili. Ni ĉiuj havas tendencon pligrandigi la pekojn de aliaj homoj kaj plimalgrandigi niajn proprajn, kiuj estas malpli malkaŝitaj. Konsciu tion, enskribu viajn kutimajn pekojn kaj analizu ilin. Atentu, ke alkoholuloj estas tre sentemaj al ĉia elmonstro de hipokriteco. Amu ilin per Biblia amo – tio estas la plej bona vojo. Komprenigu al la alkoholulo, ke ebrieco ankaŭ estas peko, kiel "malĉasteco, malpureco, voluptemo, idolkulto, sorĉado, malamikeco, malpaco, ĵaluzoj, koleregoj, partiemeco, skismoj, herezoj, envioj, diboĉadoj, kaj aliaj similaj" (Gal 5:19:21). Iufoje ankaŭ ni avidas aŭ tro manĝas. Necesas atenti, ke alkoholuloj kritike rilatas al ĉio, kio ilin ĉirkaŭas.

Ankaŭ necesas diferencii alkoholismon de hazarda ebriiĝo. Alkoholismo estas neapartigebla, ĉiame ripetanta peka maniero de vivo. Vi ankaŭ, kiel multaj aliaj en nia komunumo, emas peki. Ju pli vi pekas, des pli vi emas al peka vojo. Homoj, kiuj loĝas kune kun alkoholulo devas esti ekzemplo de humileco. Esti alkoholulo ne signifas nur trinki alkoholaĵojn, kvankam ankaŭ tion la Biblio ne aprobas. La Biblio malaprobas ĉiun kutimon, per kiu homo malbonigas sin mem aŭ estas kialo de malbono por aliaj homoj. Alkoholismo estas egoisma kutimo, kiu malutilas al la korpo, deformas la bildon de Dio; ĝi estas malsukceso provi vivi laŭ la antaŭdifinita de Dio por ni celo. Tamen, ĉiu el la supre indikitaj pekoj nepre ripetigas en la vivo de multaj kristanoj. Tio, certe, ne pravigas alkoholismon, sed paroli pri tio al alkoholuloj necesas. Ni ne akuzas la alkoholulon, ni batalas kontraŭ peko. Neniu estas forigita de Dio tiel, ke oni ne povus helpi al li. Pri tio necesas paroli denove kaj denove. Jesuo ja kuracis homojn eĉ el plej malalta socinivelo de Palestino en la unua jarcento.

LA SOLA JUĜISTO

Ni devas ne trakti la alkoholulon kiel juĝistoj, atendante taŭĝan momenton por puni lin. Nin devas gvidi amo. Kaj amon ni penas inspiri en la vivon de la alkoholulo. Kiam homoj kulpigis la virinon pri adulto, Jesuo rememorigis al ŝiaj kulpigantoj, ke ankaŭ ili estas pekuloj, laŭesence, ke ili ne rajtas juĝi ŝin. Ili unu post la alia foriras. Kaj tiam Jesuo diris al ŝi, ke ŝi ne peku plu (Joh 8:3-11). Li faris tiel por ŝia bono. Li komprenis, ke ŝi ne estis virta virino kaj li vidis ŝian ofendsenton, sed samtempe li vidis ankaŭ la hipokritecon de aliaj homoj. Povas esti ŝi dividis sian liton kun ĉiu el tiuj, kiuj nun, konvinkitaj pri sia praveco, pelis ŝin; aŭ eble ŝi sciis pri iliaj propraj moralaj eraroj. Sed la Sinjoro ne volis malhelpi ŝin penti. Kaj krom tio – neniu krom la Sinjoro rajtas malaprobi aŭ juĝi homon. Jesuo ne bezonis ion diri al ŝi. Lia perfekteco mem kulpigis ŝin pro ŝia pekemeco. Se la familio de la alkoholulo juĝas lin, ili riskas, ke li ekvidos ilian hipokritecon. Ni devas sincere diri al la alkoholulo pri niaj propraj pekoj. Tiu potenco, kiun en la societo "Anonimaj Alkoholuloj" oni nomas "supera potenco", akiras por ni realan formon – tio estas perfekta Jesuo Kristo.

PENTO PRAKTIKE

Mi akcentas, ke pento devas esti vorte esprimita, ĝi devas esti "konfeso" (1 Joh 1:9), nome, buŝa aŭ skriba klarigo de la problemo. Tio similas al preĝo aŭ voĉlego de la Biblio, kiam niaj pensoj fluas pli malrapide. Ni devas konscii ĉiujn flankojn de nia peko. Ni devas senti la malbonecon de nia peko. La alkoholulo, kiu volas ĉesi drinki, devas rememori ĉiun okazon, kiam alkohola ebriiĝo kaŭzigis malutilon. Oni povas helpi al ili ĉesi drinki, montrante al ili la longan liston, kiun ili mem kompilis. En la supra parto de tiu liasto la alkoholulo devas surskribi grandlitere: "Mi estas mensogulo". Tio pli bone ol ĉio alia helpas al li/ŝi resaniĝi (Paŝoj 4-9 en la programo de "AA").

La kredo, ke ni estis pardonitaj, estas, verŝajne, la plej granda defio al la fido de ĉiu el ni. Precipe malfacile estas tion agnoski por alkoholuloj, kies fido ne estas altnivela. Necesas paroli kun alkoholuloj, ke pardonon ricevi eblas (Lk 7:42). "Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu" (Ef 2:8,9). Neeblas kontraŭstari al la logiko de la vortoj el Rom 8: "Se Dio estas por ni, kiu estas kontraŭ ni?". Se tiom multe estis plenumita pere de la morto de la Sinjoro, kiom multe ni ricevos pere de Lia resurekto kaj nova vivo, kiun Li volas dividi kun ni. Se Dio fordonis pro ni Sian filon, kiom multe Li volas doni al ni ankoraŭ? "Kaj la leĝo eniris, por ke la eraro plimultiĝu; sed kie peko plimultiĝis, graco multe pli superabundis" (Rom 5:20). Li faras la valon Aĥor, simbolon de malglora deiro de Dio, vojo de espero, kie en unu bela tago Izrael kantos, kiel ili kantis dum la eliro el Egipto (Hos 2:14,15). La promeso pardoni niajn pekojn estas reala kaj signifoplena (1 Joh 1:9).

Por ricevi pardonon de niaj pekoj necesas penti pri ili. Penton helpas kunuleco. La ekzemplo de aliaj inspiras nin penti, eĉ se ni ne plene komprenas la demandojn koncerne nian interrilaton kun Dio. Multaj kredantoj superis alkoholismon, multaj familioj havas sperton, kiu estus utila por tiuj, kiuj bezonas tian gvidilon. Multaj homoj ankoraŭ nun penas superi alkoholismon. Vi povas interrilati kun ili, sendante al christadelphianalcoholics@bbie.org viajn mesaĝojn. Ni garantias vian anonimecon. "Anonimaj Alkoholuloj" instruas, ke interrilatoj de alkoholuloj kun homoj, kiuj penas venki la saman problemon, helpas al ili mem. Al multaj homoj tio helpis. Sed ĉu ekzistas potenco pli forta, ol la potenco de Kristo?! Interrilato kun alkoholuloj devas havi celon. La Sinjoro interrilatis kun pekuloj por alkonduki ilin al Dio. Ni ne povas supozi, ke se Jesuo partoprenis ĉe la tablo de pekuloj, tio signifas, ke ili jam estas enskribitaj en lia libro por eterna vivo. Lia kompatemo kaj insisto, persona ekzemplo de virteco kaj bonkoreco instigis pekulojn ŝanĝiĝi. Multaj kristanoj erare opinias, ke ilin malsanktigas interrilatoj kun alkoholuloj. La Sinjoro ne donis al ni similan ekzemplon. La vundita homo, savita de la Samariano, similas al multaj el ni, pekemaj kaj preskaŭ nudaj surstrate. En la memoro aperas la bildo de alkoholulo, priŝtelita kaj senvestita de socia malsano, reklamo de alkoholaĵoj kaj tiel plu. Sed la Samariano (= Jesuo) forportis lin en la gastejon kaj petis la mastron prizorgi lin ĝis kiam li revenos. La gastejo simbolas la eklezion, en ĝi ni trovas spiritan forton kaj plibonigon de nia stato. Kaj tio daŭros ĝis kiam la Sinjoro revenos.

Ĉiu membro de la korpo kontribuas al la sano de la korpo. Neniu membro povas diri, ke li ne bezonas la aliajn, "el kiuj la tuta korpo kunigita kaj kunfortikigita tra ĉiu artikolo de la livera sistemo, per energio, laŭ la mezuro de ĉiu parto, faras kreskadon de la korpo, por la sinedifado en amo" (Ef 4:16). Forto kaj energio venas al ni de la korpo de Kristo. Tragike estas, ke la korpo de kredantoj estas komprenata de multaj alkoholuloj kaj ankaŭ de tiuj, kiuj prizorgas ilin, kiel io hontiga. Tamen la veron diras la Sankta Skribo: jes, la korpo de Kristo estas granda forto kaj potenco, kaj en ĝi oni povas trovi por si helpon kaj subtenon. Ĝuste tia forto, kondiĉe, ke anonimeco estas garantiata, helpas venki la problemojn de alkoholuloj. Ni ĉiuj bezonas fortan rememorigon pri la pekoj de klaĉo kaj juĝemeco. Tiuj du komunumaj pekoj malhelpas nin iĝi la forto de bono, eĉ la hakanta tranĉrando de ĉi tiu generacio, kiun ni tiel facile povus atingi.

3.4 LA NOVA VIVO

Paŭlo kelkfoje substrekis, ke pro baptingo nia statuso ŝanĝiĝas. Antaŭe ni estis perditaj kaj implikitaj en la mondo de peko. Nun ni estas liberaj de ĝi, ni estas en Kristo. Sed malgraŭ nia nova statuso, en ni restas inklino vivi laŭ la antaŭaj moralaj principoj. Li priskribas la karakteron de la antaŭa vivo, kaj alvokas nin ĉesi vivi kvazaŭ ni ankoraŭ estas en perdita kaj sencela mondo. La fakton, ke Li konsideras nin en Kristo, kiel senmakulan fianĉinon de Sia filo, ni devas akcepti kiel devon vivi kaj konduki kiel Li. Ni devas celi iĝi tiaj, kiujn Li nin konsideras. Nur pripensu la vortojn de Dio: "Kaj nun se vi obeos Mian voĉon kaj observos Mian interligon, vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj" (El 19:5). Tiu ĉi promeso estis plenumita – Izrael iĝis Lia popolo kaj akiris la statuson de Lia "amata propraĵo", malgraŭ tio, ke ne ĉiam ili iris laŭ la vojo de Dio. Tion oni povas diri ankaŭ pri ni: same ni estis enkondukitaj en la Regnon de Lia kara filo, ni estis elvokitaj el mallumo al lumo kaj anoncitaj Lia popolo. Moseo diris: "La Eternulo promesis al vi hodiaŭ, ke vi estos al Li popolo propra, kiel Li diris al vi, se vi observos ĉiujn Liajn

ordonojn" (Read 26:18). Atentu, ke Moseo diris - "*Se vi observos ĉiujn Liajn ordonojn*". Sed malgraŭ ilia malobeemo Li konsideris ilin Sia popolo.

Jen kelkaj ekzemploj:

- "Kaj tiuj, kiuj apartenas al Kristo Jesuo, jam krucumis la karnon kun ĝiaj pasioj kaj voluptoj" (Gal 5:16-25). Por Paŭlo - la karno estas vivo antaŭ baptiĝo; la spirito – vivo post baptiĝo. Sed la galatoj, ŝanĝinte la statuson, daŭrigis la vivon de la karno.

- En bapto la efesanoj formetis la malnovan homon kaj surmetis la novan homon (Ef 4:22,23 = Rom 6:6). Sed ili ankoraŭ devis formeti la aferojn de la malnova homo - koleron, mensogon kaj tiel plu (Ef 4:25-28).

- Pri tio diras ankaŭ Rom 6, kiu estas didiĉita al baptiĝo. Paŭlo turnas sin ne al nekredantaj homoj, kiuj bezonas baptiĝi. Li turnas sin al spirite malfortaj gefratoj jam baptitaj, alvokante ilin deiri de la antaŭaj kutimoj.

- Antaŭ baptiĝo ni estis en la mallumo: "...iam vi estis mallumo, sed jam vi estas lumo en la Sinjoro; iru kiel infanoj de lumo (ĉar la frukto de la lumo estas en ĉia boneco kaj justeco kaj vero)" (Ef 5:8,9).

- Li avertas la koloseanojn malvivigi malĉastecon, malpurecon, volupton, malbonan deziron kaj avidecon, malgraŭ tio, ke ili entombigis tion ĉion dum baptiĝo (Kol 3:5 = Rom 6:6). Pli sube ni legas, ke ili jam ne faras pekojn, "en kiuj vi ankaŭ iam iradis, kiam vi vivis en ili", kvankam de ekstere ŝajnis, ke nenio ŝanĝiĝis post ilia baptiĝo (Kol 3:7). Ree Paŭlo diras, ke se ili volas esti bonaj en la okuloj de Dio, ili devas ne peki ĉiam.

- Ni obeas al la vero "por sincera amo al la frataro, amu unu la alian el la koro fervore" (1 Pet 1:22). Nia obeo al la vero de Kristo metas nin en la statuson de tiuj, kiuj sincere amas siajn fratojn.

- Tito diras al la gefratoj en Krito, ke ili estas lavitaj per baptiĝo, kaj pro tio ili devas ne paroli malbonon rilate al aliaj gefratoj, kiel ili kutimis fari antaŭe (Tito 3:2-6). Sed ili faradis tion eĉ post baptiĝo!

- Paŭlo avertas, ke nepentantaj malĉastuloj kaj pekuloj ne heredos la Regnon de Dio: "Kaj tiaj estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio" (1 Kor 6:11). Paŭlo diris, ke ili estis lavitaj per baptiĝo en la nomo de Jesuo Kristo, kaj pro tio ili devas:

- a) Agnoski, ke iliaj korpoj estas temploj de la Sankta Spirito, kaj glori Dion korpe kaj spirite.
- b) Kompreni, ke ili ne apartenas al si mem kaj ne povas vivi kiel ili volas.
- c) Agadi kvazaŭ ili agas kune kun Kristo.
- ĉ) Permesi al la potenco de la Krista resurekto agi en ilia nova vivo.

Estas sufiĉe klare, ke la korintanoj klare konsciis tion, sed daŭrigis drinkadon kaj malĉastadon. Sed Paŭlo diras, ke tiel ili antaŭe kutimis konduti. Evidente li vilas diri, ke ilia statuso jam ŝanĝiĝis kaj ili devas vivi laŭ tio. De psikologia vidpunkto peko ĉiam trovas pravigon por si. Ili ankaŭ diradis: "Viando - por la ventro, kaj la ventro – por viando". Alivorte, ni havas bazajn homajn dezirojn kaj estas vojoj por ilin kontentigi. La respondo de Paŭlo estas jena: se ni estas en Kristo, ni promesis malvivigi tiujn dezirojn, kaj se ni ilin plenumas, ni agas kvazaŭ ili estas ankoraŭ bone vivantaj. Plue, per baptiĝo ni mortas al peko, ni serĉas novan vivon, kiu nun estas en la Sinjoro, al kies korpo ni apartenas. Tiu certigo kaj defio alfrontas kristanajn alkoholulojn hodiaŭ. Vi estas lavitaj, sanktigataj, pravigitaj kaj agnoskitaj justaj. Rememoru vian baptiĝon kaj tion, kio okazis tiam. Provu vivi tiun vivon. Agu, aŭ almenaŭ provu agi, kiel Dio vin vidas. La alkoholulo bezonas rememorigon, kiel bezonis ankaŭ la romanoj, pri la grandega signifo de la fakto, ke li baptiĝis. Ili havas respondecon kaj senliman eblecon pro tio. Rememorigu al ili pri tiu tempo, kiam ilia vivo en Kristo nur komenciĝis. Parolu kun ili pri tio...

La frukto de la Spirito inkludas mensajn vidpunktojn, kiuj helpas prepari veran venkon super alkoholismo. Profundaj timoj, ke la alkoholulo neniam ĉesos drinki, povas alkonduki al tio, kion ni timas. Se la problemo estas rekonita, tro akra reakcio kaj rapidaj agoj ne estas saĝaj agoj. Tiuj, kiuj loĝas kune kun alkoholuloj devas iom-post-iom prepari grundon por evoluo de la sekvantaj spiritaj trajtoj:

POZITIVA PENSADO

Alkoholuloj kaj iliaj familianoj estas facile kaptitaj de la sindromo de "batalo-aŭ-flugo". Ili volas senprokraste kaj per ĉiuj rimedoj superi la problemon, al ili ŝajnas, ke la sola solvo estas mergi pli profunde en ĝin.. Kredo je la vero de Dio donas al ni eblecon atingi almenaŭ iom da pozitiva pensado. Ni legas en la Biblio: "*Fine, fratoj, kio ajn estas vero, kio ajn honesta, kio ajn justa, kio ajn ĉasta, kio ajn ŝatinda, kio ajn bonfara; se estas ia virto, se estas ia laŭdo, tion pripensu*" (Fil 4:8). Celu akiri pozitivecon pri aferoj, kiuj ne rilatas al la alkohola problemo, penu partopreni la laboron de la Sinjoro en aliaj sferoj, kio helpas al vi superi vian kompreneblan obsedon kun la alkohola problemo, kiu ĉirkaŭas vin.

REGI EMOCIOJN KAJ AGOJN

"Homo, kiu ne povas regi sian spiriton, estas urbo detruita, kiu ne havas muron" (Sent 25:28). Tiu homo estos malforta, ofte regata de negativaj emocioj. Lia fina stato estas priskribita en Gal 5:19-21: "malĉasteco, malpureco, voluptemo, idolkulto, malamikeco, malpaco, ĵaluzoj, koleregoj, partiemeco, skismoj, herezoj, envioj, ebriceco...". Por regi siajn emociojn la alkoholulo devas lerni agnoski ilin, ĉar nur post jaroj de obsedo, personaj emocioj iĝas sensignifaj. La alkoholulo povas perdi kontakton kun si mem. Priparolu kun li liajn sentojn, kaj vi ricevos simpligitajn respondojn, similaj al "mi ne bone sanas"; sed nenion krom tio li povas klarigi. Sed pacience parolante kun li, provu pli profunde penetri en liajn sentojn.

JESUO EN NIA VIVO

Konscio de tio, ke Jesuo plenumas en nia vivo la ĉefan rolon, kuraĝigas nin ĉiujn. "Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo" (Fil 2:5). "Mi ĉion povas fari en tiu, kiu min fortikigas" (Fil 4:13). "Ĉar Dio donis al ni spiriton ne de malkuraĝeco, sed de potenco kaj amo kaj sinregado" (1 Tim 1:7).

INTERRILATOJ KUN ALIAJ HOMOJ

Alkoholuloj laŭesence estas solecaj homoj. "Ĉar se ili falos, unu levas la alian; sed ve al solulo, se li falos, kaj se ne estas alia, kiu lin levus" (Pred 4:10). La poeto de la 17-a jarcento Ĝon Donn skribis: "Neniu homo estas insulo". Kunuleco, signifoplena kunuleco, kun aliuloj estas planita al ni de la Patro. Tio estas Lia vojo por ni. Dio kreis nin tiel, ke ni bezonas aliajn homojn. "Kaj Dio la Eternulo diris: Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos al li helpanton similan al li" (Gen 2:18). Povas okazi tiel, ke familiaj kaj amikecaj komunikiĝoj ne sufiĉos por la alkoholulo. Tamen estas granda terapeŭtika valoro en la ebleco konfesi siajn erarojn al aliaj homoj (Jak 5:17), kvankam tio estas plimalfortigita se la komunumo falas en klaĉon kaj nefidemecon. Nia bezono de aliaj estas bazita ne nur sur la Biblio. Sciencistoj atestas: por ke homo fartu bone korpe kaj spirite, li devas havi sufiĉan komunikiĝon kun aliaj homoj. Por la familianoj de la alkoholulo estas malfacile akcepti la fakton, ke la alkoholulo sentas sin soleca, ĉar ili ĉiam estas apud li por helpi al li kaj evitigi malfacilaĵojn. Sed akcepto de la bezono de la alkoholulo tute ne estas konfeso, ke vi malsukcesis; estas agnosko, ke la bezono estas reala. Atentigi lin pri aliaj homoj – tio kondukos lin el la memcentreco, kiu karakterizas alkoholismon. La plej bonaj amikoj estus, certe, gefratoj, kiuj mem luktis kaj superis la saman problemon. "Se ni aflikiĝas, tio estas por via konsolo kaj saviĝo; aŭ se ni konsoliĝas, tio estas por via konsolo, kiu energias, per la pacienca elportado de la samaj suferoj, kiujn ni ankaŭ suferadas" (2 Kor 1:6). Same necesas ankaŭ fortaj ligoj inter familioj, kiuj dividas

la saman problemon; kaj tio eblas nur se ekzistas iom da malkaŝemeco. Sed certe, klaĉoj kaj malaprobaj ne fortikigos tiujn interrilatojn.

Rilatoj de homoj al alkoholuloj ludas gravan rolon. Se la alkoholulo povas esti kondukata en suprenirantan spiralon, se li estas en la korpo de Kristo, li superos la malsanon. Sed estas danĝero fari eraran paŝon, fari ĝin estas facile kaj ĝi povas revenigi la alkoholulon en malsuprenirantan spiralon. Necesas esti kune kun aliaj, kiuj ne estas alkoholuloj. Ni devas ne sekvi la intencojn de la karno (Rom 13:14) – la alkoholulo devas eviti tiujn homojn kaj lokojn, kiuj provokas lin drinki. Specialaj esploroj atestas, ke en tiuj lokoj, kie la leĝo ne malpermesas senkontrolan drinkadon, tie akre kreskas la nombro de mortoj inter alkoholuloj (11). Foresto de provokaj eblecoj malaltigas la riskon reveni al alkoholismo. Ni estas entiritaj en spiritan militon, venki en kiu ni povos nur kun helpo de Dio: "En mia koro mi konservas Vian diron, por ke mi ne peku antaŭ Vi" (Ps 119:11).

4. POST LA VENKO

Se alkoholuloj ĉesis drinki, estas ankoraŭ frue opinii la problemon venkita. Konsideru tiujn ĉi strangajn, sed realajn statistikajn fenomenojn: la plimulto da partneroj de eks-alkoholuloj denove bonvenas siajn partnerojn en familian vivon. Sed poste ili forlasas la kuracitan partneron kaj... foririnte de la edzo aŭ de edzino-alkoholulino, ili denove trovas al si partneron-alkoholulon. Kial tio okazas? Dum la periodo de alkoholismo la partnero (precipe virino) prenas al si decidojn de ĉiuj ĉefaj problemoj. Ŝi decidas ĉiujn demandojn sen konsideri la opiniojn de la alkoholulo. Ŝi kredas sin ĝusta. Ŝi estras en la interrilatoj. Kaj por ŝi estas nekredinde malfacile rilati al sia nova partnero sen iugrada malestimo kaj patronado. En tiuj okazoj povos helpi kunuleco kun homoj, kiuj spertis similajn problemojn.

Ni nurnu nin al la parabolo pri la pliaĝa filo. Povas esti, ke la jeno estas la esenca mesaĝo de la parabolo. La pliaĝa filo estis ĵaluza kaj plenigita de memkompato. Li opiniis, ke lia multajara pacienca obeado (kaj, certe, li trotaksis sian pravecon) estis forgesita tuj post la reveno de la malŝparema frato. Li ne povis pardoni al la frato, ke li malŝparis sian havaĵon per diboĉa vivado. Li ne povis pardoni la antaŭajn pekojn de sia frato eĉ tiam, kiam la frato tiel klare ekpentis. La rezulto estis tragika. Li ne plu volis partopreni en la kunuleco de sia patro. Ĉio tio, okazis sekve de lia malsukceso vere pardoni la fraton.

5. KONKLUDO

Por ĉiuj homoj kunligitaj kun la tragedio de alkoholismo aperas la demando: Kial mi? Kial mi estas alkoholulo... Kial al mi estas antaŭdestinite vivi kune kun alkoholulo? Sen kredo je tio, ke Dio ekzistas, ke Li havas rilate al ĉiuj flankoj de nia vivo Sian apartan planon, ke Li gvidas nian vivon, ni ne trovos respondon al tiuj ĉi demandoj. Mi estas konvinkita, ke Dio ne donas al ni pli ol ni povas elteni. Ĉiu el ni mem devas porti sian krucon. Kiel ajn ofte ni mispaŝas kaj falas, eĉ nia Sinjoro faletis, kiam li iris sian lastan vojon al Golgota, ni ĉiame devas vidi antaŭ ni bildon de kruco-portanta disĉipleco. La vojo donita al ni de la Sinjoro varias. Por unuj estas alkoholismo, por aliaj – geedza perfido, narkotaĵoj, korpa aŭ mensa neperfekteco. Tiun ĉi liston oni povas daŭrigi, dirante pri la sorto de ĉiu infano de Dio. Ĉiu el ni havas sian propran krucon, kaj sian vojon por iĝi simila al la Sinjoro, kiu alvokas nin.

Kiel diris mia amiko Stiv Ĝonson: "Estas procezo, sed ne rezulto". Aŭ kiel alia frato Ĝon Stibbs diris al mi dum sia persona tragedio: "Estas la veturo, ne la fina haltejo". Sendepende de tio, ĉu ĉesos via familiano drinki aŭ ne, viaj agoj preparas vin por via ĉefa antaŭdestino – la Regno. Certe, estas malfacile akcepti tion mense, ĉar ni vivas en la mondo, en kiu oni strebas havi feliĉon kaj plezurojn tie ĉi kaj jam nun. Ŝajnas, ke Dio estas malproksime de ni. Sed peni kompreni la spiriton de Manoaĥ, kiu volis, ke Dio ĝuste en tiu momento sendu anĝelon al li por doni konsilon rilate al lia filo Ŝimŝon. "Kaj la anĝelo de la Eternulo ne montris sin plu al Manoaĥ kaj al lia edzino. *Tiam Manoaĥ konvinkiĝis, ke tio estis anĝelo de la Eternulo*" (Juĝ 13:21), kaj ke Dio atentis pri ili. Tio rilatas ankaŭ al ni kaj al aliaj homoj.

Jeremia vidis sian amatan popolon, preskaŭ detruitajn pro iliaj agoj kaj konvinkoj. Li komprenis, ke krom la graco de Dio, ili ĉiuj estus konsumitaj. Li dankis Dion: "Ĝi estas favorkoreco de la Eternulo, ke ni ne tute pereis; ĉar Lia kompatemeco ne finiĝis, sed ĉiumatene ĝi renoviĝas; granda estas Via fideleco. Mia parto estas la Eternulo, diras mia animo; tial mi esperas al Li. La Eternulo estas bona por tiuj, kiuj esperas al Li, por la animo, kiu serĉas Lin" (Plor 3:22-25).

ALDONO 1: LA DEK DU PAŜOJ

1. Ni agnoskis, ke ni estas senfortaj en la batalo kun alkoholismo, ke niaj vivoj ne plu estas regataj de ni.
2. Ni komencis kredi, ke potenco pli granda ol ni, povas resanigi nin.
3. Ni faris decidon dediĉi niajn vivojn al Dio, disponigi al Li niajn zorgojn.
4. Ni esploris nin mem.
5. Ni konfesis al Dio, al ni mem, kaj iu aliulo, la precizan naturon de nia eraro.
6. Ni estis pretaj, ke Dio forigu ĉion malbonan en nia karaktero.
7. Ni humile petis Lin forigi ĉiujn niajn malperfektaĵojn.
8. Ni listigis ĉiujn homojn, al kiuj ni iam ajn malutilis kaj fariĝis volonta kompensi ĉiujn.
9. Ni faris rektan kompenson al tiuj homoj, krom se tia faro malutilus al aliaj.
10. Ni daŭrigis esplori nin mem, kaj kiam ni eraris, ni senprokraste konfesis.
10. Ni celis pere de preĝoj kaj meditoj plibonigi nian kontakton kun Dio, laŭ nia kompreno de Li, petante Lin nur pri scio de Lia volo por ni, kaj pri povo tion efektiviĝi.
11. Ricevinte spiritan sperton kiel la rezulton de tiuj ĉi paŝoj, ni provis sciigi ĝin al alkoholuloj kaj praktiki tiujn principojn en ĉiuj niaj aferoj.

ALDONO 2: KELKAJ KRISTANAJ FONTOJ

Ret-adreso por korespondi kun aliaj kristanaj alkoholuloj kaj iliaj familianoj:

info@carelinks.net

En Orienta Eŭropo konsultejo en la rusa kaj en la angla:

a.k 90, Riga 1007, Latvio;

p.o. Box 3034, South Croydon, Surrey, CR2 0ZA England

RIMARKOJ

- (1) Caroline Knapp, "The Glass Half Empty", *The New York Times Magazine* (09.05.1999), p. 19.
- (2) Jean Kinney & Gwen Leaton, *Loosening The Grip: A Handbook Of Alcohol Information* (S-Louis: Mosby, 1995) p. 21. Tio estas tre valora fonto de statistiko kaj faktoj koncernaj al alkoholismo.
- (3) La ĉefa provo pravigi sintenon de alkoholo mi renkontis en Peter Masters, *Should Christians Drink? The Case For Total Abstinence* (London: Wakeman, 2001).
- (4) Jorge Valles, *Social Drinking And Alcoholism* (Texas Alcohol And Narcotics Educations Council, 1965) p.14.
- (5) Darry Inaba & William Cohen, *Physical And Mental Effects Of Psychoactive Drugs* (Ashland, OR: C.N.S.,1993), p.135.

- (6) Roy Hatfield, "Closet Alcoholics In The Church", *Christianity Today*, 18 August 1981 p.28.
- (7) Pri tio skribis Andre Bustanoby, *The Wrath Of Grapes* (Grand Rapids: Baker, 1987).
- (8) Jean Kinney & Gwen Leaton, *Loosening The Grip: A Handbook Of Alcohol Information* (St Louis: Mosby, 1995), p.21
- (9) Por liberiĝi de alkoholismo legu la pruvojn de frato Peter Bayliss en *The Perlis Of Drug And Alcohol Abuse* (Birmingham: Care Group Publications).
- (10) Paul Martin, *The Healing Mind*, 1997, p.157.
- (11) K.M. Magruder "The Association Of Alcoholism Mortality With Legal Availability Of Alcoholic Beverages", *Alcohol And Drug Education*, 1976
